

Fenikso

Revuo de Esperanto Nederland

25a jarkolekto • n-ro 5 | septembro - oktobro 2020

**Esperanto prezentado
en Zutphen**

Nederlandse

Esperanto jongeren in Onze Taal-

Multaj partoprenantoj en IJK

**La jarkunveno
okazos la 7an de nov
2020 en Utrecht**



Marc Konijnenberg

7 op Radio 1 bij Fris!

11

**Diversaj leteroj
de membroj**

24

**Geld nodig voor de
school in Togo**

27

Senpagaj libroj



8

**Extinction
Rebellion**


Fenikso Forumo de Esperanto Nederland

Dumonata membrogazeto de Esperanto Nederland
ISSN 1384-6515

Membroj de Esperanto Nederland ricevas la gazeton.
La jara kotizo estas € 35,-
(por samdomanoj €12,50).
NEJ-anoj pagas € 15,-
(por samdomanoj € 5,-).

Fenikso estas aparte abonebla nur por ne-membroj en eksterlando.
La tarifo estas € 20,-.
Vidhandikapitoj povas ricevi kasedan version de Rob Moerbeek, vidu dekstre.

Kunlaborantoj de Fenikso:

Ĉefredaktoro: Foppe-Klaas Hovinga
Redaktoro: Andries Hovinga
Korektantoj: Marc Konijnenberg kaj Bert de Wit
Konsilanto: Ineke Emmelkamp
 Redakcio@esperanto-nederland.nl

Limdato:

Materialo por la sekva numero estas bonvena ĝis la 2a de oktobro 2020.

Informoj pri Esperanto:

Ineke Emmelkamp
Arubastraat 12, 9715 RW Groningen
(info@esperanto-nederland.nl)
tel.050-5718842

Studie-weekeinde:

studosemajnfino@esperanto-nederland.nl.

Esperanto Nederland enrete:

Retejo: <https://www.esperanto-nederland.nl>
Fejsbuko: facebook.com/esperanto.nederland
Telegramo: <https://t.me/EsperantoNederland>
Tvitero: <https://twitter.com/esperantonl>

Sendu viajn respondojn al:

redakcio@esperanto-nederland.nl

Estraro

- **Estraro:** estraro@esperanto-nederland.nl

- **Prezidanto:** Said Mozaffari Baluchi,
(prezidanto@esperantolett-nederland.nl)
tel. 06 84316394

- **Sekretario:** Ineke Emmelkamp,
Arubastraat 12, 9715 RW, Groningen
(sekretario@esperanto-nederland.nl)

- **Kasisto:** Loes Demmendaal,
Duikerlaan 160, 2903 AC,
Capelle a/d IJssel.
(kasisto@esperanto-nederland.nl)
tel.010 2133320

- **Estrarano:** (i.a. pri instruadaj aferoj):
Rob Moerbeek,
Zwaansmeerstraat 48, 1946 AE, Beverwijk.
(rob.moerbeek@esperanto-nederland.nl)
tel.0251 231079

- **Estrarano:** Andries Hovinga,
De Fennen 47, 8918 CC,
Leeuwarden, tel.06 28916262
(andries.hovinga@esperanto-nederland.nl)

- **Pri sociaj komunikiloj:**
(sociaj-komunikiloj@esperanto-nederland.nl)

Membro-administranto:

Koos Scharroo,
Vaartweg 24G, 8382 EB, Frederiksoord
(membroj@esperanto-nederland.nl)
tel.06 22413267

Bv. informi pri (ŝanĝoj de) poŝtadreso,
telefonnumero, retroŝtadreso, (eks- kaj
ali)membriĝo, pagmaniero

Bankkonto:


IBAN: NL 10 TRIO 0786 8441 67
nome de Esperanto Nederland,
Capelle aan den IJssel.

Eventueel retouradres:

Esperanto Nederland Ledenadministratie
Vaartweg 24G
8382 EB Frederiksoord

En tiu ĉi numero

4. Mallongaĵoj
5. Novaj membroj, novaĵoj
6. Reagoj de legantoj
8. Klára Ertl pri Extinction Rebellion
10. Nekrologo de Nel Overwater
11. Reagoj de legantoj
12. La unua virtuala kongreso
13. Esperanto jongeren in Onze Taal
14. Voorstellen redacteur Andries Hovinga
15. De la estraro
16. Revuo interŝanĝo de Alfonso Pijnacker
17. Pri lingvoj
18. Generaals zonder leger
19. En la amaskomunikado
20. Felietono "Rotterdamo 2020"
21. 90-a datreveno de IEI, raporto pri IJK
22. De VN 75jaar
23. Vortserĉenigmo
24. School in Togo
26. Libroj
27. Senpagaj libroj
28. Invito al Esperanto-studoposttagmezo



Marc Konijnenberg reprezentas Esperanto Nederland en komitato-kunsido de UEA.

Foto sur la kovrilo

S-ino F.C. Reibestein-v.d. Does el Hago respondis al nia alvoko en la lasta numero de Fenikso kaj priskribis kiel ŝi kaj ŝia edzo spertis la kronvirusan tempon, i.a. sidante sur la balkono kaj ĝuante la sunon. En paĝo 6 vi povas legi la tutan mesaĝon.

Antaŭparolo

Op 21 september 2019 vocht ik met de demonen een bang gevecht. Mijn groepsleden boven op de toren van de Lebuinus in Deventer lieten een enorm spandoek naar beneden zakken. Twee personen, waarvan ik er een was, hielden de touwen aan de onderkant van het spandoek vast om het zo op zijn plaats te krijgen. Maar de wind had veel kracht. Mijn touw haakte vast achter de monsterlijke beelden en ik vreesde dat zij door het trekken naar beneden zouden storten. Na afloop kreeg onze leider flink op de kop van de koster. Aldus mijn eigen ervaring met XR, ofwel Extinction Rebellion. Klára Ertl beschrijft wat Extinction Rebellion is en wat haar dreef om zich bij deze beweging aan te sluiten.

Het betrokken zijn bij de wereld maakt onderdeel uit van de Esperanto cultuur. In dit nummer staan enkele artikelen daarover. Zo schrijft Rob Moerbeek over het belang van 75 jaar VN. Ineke Emmelkamp heeft diverse boeken over China gekregen en geeft die nu gratis weg (alleen verzendkosten). En Ans Bakker vraagt om een school in Togo financieel te ondersteunen. Zowel wij als het bestuur ondersteunen deze oproep van harte.

Het goed gebruik maken van media is ondertussen ook een belangrijk aspect van de Esperanto cultuur geworden. Er zijn diverse artikelen die dat aantonen. 1852 personen deden mee aan het eerste virtuele congres van de UEA. Bert de Wit beschrijft de voor- en nadelen van virtueel bijeenkomen. Antonia Montaro uit Zweden schrijft over het succesvolle jongerencongres IJK.

Meer aspecten van onze cultuur schetsten de jongeren van NEJ in het blad Onze Taal, waarvan wij een korte samenvatting geven.

We hebben veel e-mails toegestuurd gekregen. Allen hartelijk dank daarvoor. Hierdoor hebben we er opnieuw een dubbeldik nummer van gemaakt.

We wensen je veel leesplezier.

Foppe-Klaas Hovinga
Hoofdredacteur

Filmeto pri Fenikso

Por la prezento de Esperanto Nederland en la Movada Foiro Marc Konijnenberg petis al la redaktoroj krei mallongan filmeton pri Fenikso. Ne restis multe da tempo, do Andries kolektis malnovajn Feniksojn, afiŝojn pri Nederlando kaj petis siajn parencojn ludi rolon kiel figurantojn dum tiu semajnfino kiam ĝuste okazis familia renkontiĝo. Eĉ la plej juna parenco volis kunlabori.

La filmeto (<https://youtu.be/IAawb0RzfHE>) estis montrita en la Movada Foiro, Virtuala Kongreso (VK), la 5-an kaj 6-an de aŭgusto kiel parto de la prezentado pri Esperanto Nederland. Marc bone preparis kaj gvidis tiun virtualan kunvenon. La lumbildojn de lia prezento kaj ligilojn al la aliaj filmetoj kiujn Marc montris, vi povas trovi en la retejo de Esperanto Nederland.



Enketo de UEA/TEJO

Pri membreco kaj monataj pagoj

La estraroj de UEA kaj TEJO diskutas la eblon enkonduki monatan membrecon en la organizoj. Ili petas al ĉiuj esperantistoj, ĉu membro de UEA/TEJO aŭ ne, plenumi tiun ĉi enketon pri la avantaĝoj de membreco kaj pagmanieroj por iĝi membro de UEA/TEJO, por ricevi kiel eble plej precizan reprezenton de la sintenoj inter la esperantistoj.

Al la enketo: <https://forms.gle/8AUMCbGD8vGs8N4o7> aŭ <https://tinyurl.com/y43wx92u>

UEA - Universala Esperanto-Asocio kunlabore kun TEJO - Tutmonda Esperantista Junulara Organizo.

De besturen van UEA en TEJO overwegen maandelijks lidmaatschap te introduceren. Aan alle esperantisten, of je nu lid bent of niet, vragen zij om deze enquête in te vullen

Foĉjo, la pigra foko

Mi pensis: mi bezonas mallongigi mian nomon. "Foppe-Klaas", ĉu "Foĉjo" eblas? Sed Google Translate tradukas ĝin per "Zeug". Ho ne, malbona ideo! Sed mi ankaŭ trovis la rakonton pri Foĉjo, la pigra foko. La rakonto estas sur la retpaĝo "La suneto por memoro" kiu enhavas 39 belajn rakontojn, verkitajn de Miĥail Plackovskij kaj kun pentraĵoj de V. Sutejev.

Se vi volas laŭte legi al malgrandaj infanoj, nepre rigardu ĉi tiun paĝon.

Por iri al la retpaĝo plej rapide, serĉu en la interreto la vortojn: "La suneto por memoro" kaj "Plackovskij".

Foppe-Klaas Hovinga



http://mpovorin.narod.ru/porinfanajxoj/la_suneto_por_memoro/la_suneto_por_memoro.html

Bonvenon!

Post la apero de la numero 2/3 de Fenikso tri novaj membroj aliĝis, el diversaj partoj de Nederlando:

- Rinus Loof-van Overmeeren el Almere
- Nico Weenink el Noortdorp
- kaj Hans Stribos el Heerlen.



Intertempe ili ĉiuj ricevis koverton kun diversaj materialoj pri nia asocio.

Mi esperas ke ili dum jaroj restas niaj membroj kaj ke ni iam renkontos ilin dum jarkunveno, kultura tago, studsemajnfino aŭ internacia kongreso. Mi vidis ke unu el ili jam aliĝis al 'Amikumu'!


Ineke Emmelkamp,
Sekretario Esperanto Nederland – sekretario@esperanto-nederland.nl

Novajoj

Nieuwe voorzitter Taalverdediging

Vanaf dit jaar is Simon Smits uit het Zeeuwse 's Heerenbroek voorzitter van de stichting Taalverdediging.

Simon Smits is lid van Esperanto Nederland. Via de radio ontdekte hij het bestaan van Esperanto. Hij volgde een cursus Esperanto en is sindsdien bij de Esperanto Beweging aangesloten.



Stichting Taalverdediging heeft als doel om het gehele openbare leven in Nederland in het Nederlands te laten afspelen en een dam op te werpen tegen de instroom van vreemde (Engels) woorden in het Nederlands. Ze streven naar het behoud van het Nederlandse taalgebied, ook binnen de landen waar Afrikaans gesproken wordt.

Bron: *Nieuwsbrief Taalverdediging 2020 nummer 2*



Esperanto prezentado

Sabate la 12an de septembro je la 14h Pieter Engwirda faros prezentadon pri Esperanto.

Ke Esperanto estas pli ol nura lingvo, pri tio Pieter Engwirda faros prezentadon ĉe renkontiĝo de la Derde Fase, asocio por homoj en Zutphen kiuj volas subteni unu la aliajn dum la maljuniĝo.

La prezentado daŭros duonhoron. Poste sekvas duonhoro por fari demandojn kaj diskuti pri Esperanto unu kun la alia. Fine estas trinkaĵo kun dolĉaĵoj.

Loko: en la ĉambrego de la Christengemeenschap, Badhuisweg 27 en Zutphen.

Gastoj estas bonvenaj. Bonvolu aliĝi al la diskuto pri Esperanto. Pro la kronviruso gravas, ke vi registru vin anticipe: pieter.engwirda@gmail.com.

Reagoj de legantoj (1)

Kiel vi fartas? (1)

En la lasta numero de Fenikso ni alvokis vin konigi viajn spertojn dum la kronviroza kvaranteno en ĉi tiu revuo.

La 25-an de julio ni ricevis de S-ino F.C. Reibestein-v.d. Does el Hago jenan leteron

Estimata redaktoro.

Mi volonte dividas la sperton de mia edzo kaj mi dum la kronviroza tempo. Ni fartas bone kaj ni sekvas ĝis nun ĉiujn konsilojn de la registaro. Ni estas 86- kaj 75-jaraj kaj ni feliĉe kapablas zorgi unu por la alia. Mi scias, ke nia sperto estas malsama al tiu de aliaj. Ĉar ni estas kune en ĉi tiu terura tempo kaj povas helpi unu la alian.

Estis ege malagrabla, ke ni ne povis akcepti viziton de niaj parencoj kaj ni ne povis fari tion, kion ni kutimis, sed ni uzis "WhatsApp" kaj saĝtelefonon kaj tiumaniere ni kontaktis niajn parencojn kaj konatojn.

Ni ne iris eksteren, krom por butikumi. Estis agrable, ke homoj, kiuj aĝas pli ol 70 jaraj, rajtas butikumi frue, inter la 7-a kaj 8-a horo.

En la proksima parko ni pene promenis, ĉar diversaj personoj ne sekvis la regulojn.

Ni serĉis la kvietajn stratojn kaj ni povis tiumaniere iomete promeni. Ni posedas grandan balkonon, sur kiu ni ĝuis la sunon. kaj ni amuziĝis

ene per niaj hobiaj, legis multe kaj manlaboris.




Ĉiutage per komputilo ni sekvis la novaĵon. Ho ve, tiom da homoj suferis de la viruso kaj multaj mortis. Espereble la venonta vakcino povos helpi la mondon.

Ni akceptis viziton antaŭ fermita fenestro sur la galerio de nia apartamento. Estis tre agrable vidi ilin kaj ni povis paroli korpe. Malgraŭ ĉio ni ofte dormas malbone kaj estas streĉaj kaj restas singardaj. Sed ni rimarkas, ke homoj iĝas malzorgaj pri la buŝ-nazŝirmiloj, la festoj, kaj la ferioj. Bedaŭrinde, ĉar la viruso ankoraŭ ne malaperis, ĉu ne?

Ni esperas je pli bona tempo, ĉar nun estas terure. Mi kore salutas vin,

S-ino F. C. Reibestein-v.d. Does



Kiel vi fartas? (2)

La 31-an de julio Kees Neeft el Leiderdorp skribis jenan leteron

La unuajn monatojn de ĉi tiu jaro ni okupiĝis pri aĉeto de nova domo kaj vendo de nia malnova domo. Ĉe la transdono al ni de la nova domo kaj ni kaj la vendisto kaj la notario ne donis manojn. Ĉe la transdono de nia malnova domo ni devis eĉ antaŭe signi por rajtigo de iu kunlaboranto de la notario. La transdono de la ŝlosiloj estis en la domo per la makleristo al la novaj posedantoj, kiujn ni vidis la unuan fojon, kun sufiĉa distanco.

Mia partopreno en la ĉi-jara kampanjo de la CNV helpi la membrojn fari la impostdeklaron estis nur unufoja. Poste ĉio estis nuligita de la CNV (lastasemajne la kampanjo estis reprenita, sed mi

senkulpigis min pro mia aĝo kaj mia kunulino).

En junio la naskiĝtago de mia edzino ni povis festi kun niaj infanoj, denove kun sufiĉa distanco, ĉar je tiu momento la situacio ŝajnis iom pliboniĝinta. Ankaŭ kun la parencoj de ambaŭ flankoj aparte.

Tiun saman monaton ni aŭdacis mem preni nian ruldomon por kampadi en la oriento de nia lando, ankaŭ ĉar la kampadejoj estis sufiĉe preparitaj al kronviruso.

Ĝenerale, por la resto, ni kiel pensiitoj ne multon ŝanĝis pro la kronviruso en nia vivo.

Kees Neeft, Leiderdorp

Kiel vi fartas? (3)

Anneke Schouten-Buijs el Dintel sendis jenan mesaĝon.

Karaj geamikoj,

Jen iomete kiel mi travivis/as la strangan nuntempon. Mi vizitas la vendejon sed nur en nia kvartalo, ne en la urbocentro, telefone 'vizitas' parencojn kaj gekonatojn, mia edzo dum 3 monatoj ne akceptis masaĝklientojn.

La unua ne-okazinta kunveno estis la bahaa novjaro, Naw-Rúz, la 20-an de marto. Tiam neniu en nia malgranda komunumo spertis pri Zoom, sed baldaŭ eblis regule kunveni pere de ĝi.

La kunveno por kontroli la kason de Osteoporosevereniging Nederland, kunveno de Pax pri la venonta pacsemajno, internacia konferenco pri paco kiu devus okazi en la Pacpalaco en Hago, ĉiujn tri kunvenojn mi partoprenis pere de Zoom aŭ alia tia eblo.

Komence de aprilo ni rezignis pri aviadila vojaĝo al Rumanio, kie la plej aĝa filo kaj familio loĝas kaj nur interrete ĉeestis la 20-an naskiĝtagon de nia nepino. Ankaŭ en aŭgusto ni ne vojaĝos tien pro la ebleco ke oni postulos 14-tagan hejmizoladon tie aŭ post nia hejmvveno. Tamen ni feris en Germanio por partopreni SEF, la Somera Esperanto Familia tendaro, kiun la unuan fojon ni vizitis en 1989, la lasta GDR-jaro. Infanoj el tiu tempo nun mem havas infanetojn! Ni ne plu tendumas, kaj jam la trian fojon loĝis en barelo, kiu certe



Sur la foto: la edzo de Anneke apud la barelo.

estis pli komforta ol tiu de Diogeno. Ni ĝuis la renkonton kun trideko da geamikoj - kutime venas 60-80 personoj - kaj la belegan naturon apud Feldberg, norde de Berlino, kaj restis plian semajnon. La kunportitajn Esperanto-librojn kaj ekzemplerojn de Fonto niaj geamikoj ĝoje akceptis.

Do jes, mia ĉiutaga vivo ŝanĝiĝis, tamen ne tro...

Anneke Schouten-Buijs

La "Interview met Saïd Mozaffari Balouchi"

La 21an de julio Gerrit Berveling sendis jenan leteron al ni.

En FENIKSO kun plezuro mi legis la intervjuon kun Saïd Mozaffari Balouchi. Het enige dat ontbreekt is zijn leeftijd; zou dat schroom zijn?

Laŭ mi bonega ideo intervui iom konatajn esperantistojn nialande! Daŭrigu!

La kursiva aldono – paĝo 11 – pri Esperanto bedaŭrinde enhavas seriozan eraron: L.L.Zamenhof ne estis POLA okulkuracisto, sed JUDA, aŭ se naciecon vi ŝatus aldoni: RUSA – junaĝe li eĉ revis fariĝi serioza rusa aŭtoro. Neniam ankaŭ li loĝis en Pollando. Kore! Gerrit Berveling

Reago de la redakcio:

La intervjuo estis kopiita unuope de la revuo 'Thuis in Epe'.

Saïd Mozaffari Balouchi sciigas nin, ke sia aĝo ne estas sekreto. Li havas 58 jarojn.

Pri la nacieco aŭ identeco de L.L. Zamenhof. La nederlanda Vikipedio mencias ke li naskiĝis en Pollando, kaj estis de juda origino. La pola kaj rusa Vikipedio-j skribas, ke li estis pola okulo-kuracisto. Oni povus verki librojn pri ĉi tio. Do jen mi lasas ĝin ĉe tio, kion ĉi tiuj retejoj skribas.

Extinction Rebellion

Extinction Rebellion estas internacia, socia movado, kiu per neperforta protesto batalas kontraŭ klimatsanĝiĝo. Klára Ertl estas ne nur Esperantisto, sed ŝi ankaŭ okupiĝas en tiu movado kaj kunigas ambaŭ.

Mi eksciis pri la movado Extinction Rebellion (XR) antaŭ unu jaro, legante pri ĝi en De Groene Amsterdammer*. Mi jam antaŭe ĝojegis pri la homamaso, kiu blokadis pontojn en Londono en 2018 por protesti malsufiĉan registaran agadon pri nia ekologia kaj klimata krizoj. Mi ankaŭ sciis pri Greta Thunberg, kaj iom hontis ke mia generacio ne komencis lerneajn strikadojn antaŭ tre longe. Sed mi ne sciis ĝis tiam, ke la pontblokantoj instigis tutmondan movadon. La artikolo raportis, ke ribeluloj de XR Nederlando blokadis aŭtovojojn en la ĉefurbo dum po 7 minutoj, kaj saltis en kanalon en Amersfoort dum Reĝtago en la momento, kiam la reĝo pasis tie kun nacia televid-teamo. Super la naĝantoj malfaldiĝis bendego kun la



Loka agado de XR Amsterdamo: la laborgrupo pri Politika Strategio dum la unua fizika ĝenerala kunveno ekde kronviruso fine de junio.

vortoj “Amersfoort aan Zee” (Amersfoort ĉe Maro), rilate al la reala risko, ke granda parto de Nederlando subakviĝos dum ĉi tiu jarcento. Mi tuj sciis, ke mi estu parto de tio.

Miaj kialoj aliĝi al XR similas al tiuj de aliaj ribeluloj. La movado finfine montris al mi ke mi ne solas, malracias aŭ trosentemas kun miaj zorgoj pri nia klimatkatastrofo, kaj ni kune povas postuli drastan agadon de registaroj. Fakte, mi nun miras kiom longe ni ĉiuj povis kredi, ke ni estas solaj kaj senpovaj. Estas kvazaŭ subite, multaj homoj samtempe vekigiĝas el longa vekdormo. Ni scias pri la homkaŭzita tervarmigo jam de almenaŭ 50 jaroj. Dum jardekoj ni havis naturprotektajn organizojn, sabotadon de petrolborado, stratprotestojn, peticiojn, amason da filmoj, libroj, sciencaj studoj kaj politikaj babiladoj. Dume, daŭre kreskis nia troa produktado de CO2. Mi aĝas 25 kaj mi ne memoras tempon en mia vivo, kiam mi ne sciis pri la problemo. Mi sciis pri ĝi ekde la aĝo, kiam oni kapablas kompreni ĝin. Miaj kunklasanoj ridis pri mi, ĉar mi insistis malŝalti la lumon de la klasĉambro. Hodiaŭ mi komprenas, ke tio estis iluzia provo regi problemon tro enorman por mia menso. Estas komprenebla, ke nura infano en la jaroj

2000 provas kredi kion diras ŝia panjo – “ja la homaro ĉiam trovis, kaj ĉiam trovos solvon al ĉio” – kaj provas silentigi per butonpremo la konsciiĝon, ke plenkreskuloj fiaskas pri nia plej terura problemo. Sed tia menstrankviligo per mallongaj duŝoj kaj reciklado kutimas ankaŭ por plenkreskuloj en 2020. Mia generacio kreskis kun kulposento, kiun ĝi konsideras evidenta. Ĉu ni – ĉefe mezklasaj, blankaj eŭropanoj – ne ĉiuj kulpas same je detruado de naturo?

La respondo de XR estas: Ne.

La movado rompas tiun longdaŭran iluzion de la individua klimatkalkado, kiu longe pasivigis nin. Ĝi montras kiel grandfirmaoj mem nutris tiun iluzion, kiu pluigas misagadon fare de tiu, kiu vere havas povon. Tiu, kiun ni plenfide elektis por gvidi kaj protekti nin; kiun ni obeas; al kiu ni pagas monon por bona funkciado de socio; kiu kreas leĝojn kaj respektigas ilin; kiu povas subvencii bonan agadon kaj puni malbonan; kiu respondecas reprezenti la interesojn de civitanoj. La registaro. Povas ŝajni heroe, iri al la Arkta maro kun ŝipo kaj ĝenadi tie la agadon de grandaj petrolfirmaoj. Sed estas neniu publiko por vidi tion, kaj ĝi ne malhelpas ŝtatojn, daŭre subvencii poluajn industriojn. Kvankam ili ŝajnas nedetruablaj, multaj el ili jam delonge bankrotus sen la subteno de

ŝtatoj. Kio estis nova pri XR kaj famigis ĝin, estas ke ĝi agadas en plenpublikaj lokoj kaj celas siajn petojn al registaroj.

Kiam mi serĉis informojn pri mia loka XR-movado, mi tuj trovis bonvenigan kunvenon proksime de mi. La reta evento montris bildstrion de virino en kinejo, kiu enuas pri la filmo kaj diras: "La vivo certe estas pli ol tio. Eble mi aliĝu al XR." Kaj la bildo, kaj mia unua kunveno, samtempe motivigis kaj timigis min. Finfine mi havis okazon agadi pri tio, kio plej gravas al mi, sed kiel? Ĉu mi kuraĝus? Ĉu mi entute havus tempon? Jam mia vivo eksplodas pro farendaĵoj. Sed kiel mia pianinstruisto iam diris: "Tempon oni neniam havas, tempon oni kreas." Sen pripensado aŭ planado, la movado iom post iom entiris min. Mi ĉeestis stratproteston, partoprenis tutlandan renkontiĝon, kaj subite iun septembran vesperon, en bonega etoso kun okdeko da kunribeluloj, mi faldis kaj enkovertigis leterojn pri la klimatkrizo kiuj komence ŝajnis esti de la urbestro, kaj mane liveris ilin tra la urbo. Mi partoprenis nian grandan oktobran ribelon, ĉeestis malferman kunsidon de la laborgrupo Outreach & Training (varbado, enmovadigo kaj trejnado), kaj en februaro jam estis unu el ĝiaj kernaj aktivuloj. Du monatojn poste mi ankaŭ iĝis ĝia reprezentanto ĉe la loka kunordiga teamo, kaj ek esploris pri pli ambiciaj kaj interlandaj projektoj. La kronviroza krizo devigis nin malkovri novajn agadeblojn kaj fortigi internacian kunlaboron. Mia enmovadigo ŝajnis al mi rapida, sed fakte malrapidis laŭ XR-normoj. Daŭre ensaltas novuloj en kernajn poziciojn, homoj interŝanĝas siajn taskarojn, kaj ĉiu havas personajn ciklojn da aktiviĝo kaj retiriĝo. Tio iras glate, ĉar ni ribeluloj havas grandan motiviĝon, kiu fontas el nia senesperaĵo. Oni rapide lernas de aliuloj, kaj ĉiuj informoj, rimedoj, trejnadoj facile alireblas.

En Esperantujo ofte malsamas la kialoj eniri la movadon kaj la kialoj resti en ĝi. Estas same kun XR. Mi restas pro du ĉefaj kialoj. Unu estas ke mi rimarkis, kiom multan atenton ĝi donas al la esencaj ligoj, kiujn la naturkrizo havas kun rasismo, koloniismo, subpremado de indiĝenaj popoloj, kaj monda egaleco. Kelkaj aktivuloj eĉ konsideras tion la kerno de ĝia agado. Alia kialo estas tio, kion XR nomas "regenerativa kulturo". Ĝi estas aro da principoj, kutimoj kaj agmanieroj, kiuj temas pri profunda atento al fizika kaj mensa bonfarto de si mem kaj aliaj homoj. Ĝi ebligas longdaŭran agadon, kiu ne elĉerpas, sed male psike plibonfartigas nin. Temas ekzemple pri

aktiva inkluzivigo de ĉiu ajn kaj de ĉio, kion ri portas kun si; egaleco de ĉies ideoj kaj opinioj sendepende de roloj, ekde kiom longe aŭ kiom multe oni aktivas; akcepto de alies sentoj, (ne)agado en persona vivo, aŭ (ne)disponeblo. Ni honeste kunhavigas sentojn kaj impresojn je ĉiu kunveno kaj agado, malferme aŭskultas, trejnatas senperfortan komunikadon, kaj havas bonfart-teamojn. Ni konscie kontraŭas povstrukturojn, instigas al regula transdono de roloj, kaj multe pli, kion mi ne havas spacon listigi!

Ĉi tiu kulturo de XR tre bonfartigas min dum mia agado por la movado. Mi ankaŭ ĝojis malkovri, ke pluraj aliaj Esperantistoj ankaŭ agadas en XR. Ekzemple, se vi partoprenos internacian renkontiĝon kie ĉeestas Tim Morley, li tre verŝajne prezentos Esperante la klasikan prelegon de XR pri la klimatkrizo kaj la agadprincipoj de XR.



Loka agado de XR Amsterdamo: Amasbiciklado al la sidejo de aviadilkompanio KLM komence de julio.

Ni kreis grupon por Esperantaj ribeluloj, kie ni pridiskutas XR-rilatajn temojn kaj kunhavigas ideojn, spertojn kaj enhavojn de niaj lokaj movadoj. Ni ankaŭ helpas nin konkrete: Mi partoprenis kunvenon de la Barcelona XR-movado, post kontaktiĝo kun tiea Esperanta ribelulo. Mi translokiĝos ja al Barcelono tre baldaŭ kaj daŭrigos tie mian agadon. Ĉar estas tute alia lando, lingvoj kaj kunteksto, mi surpriziĝis pri tio, kiom da komunaĵoj kaj malkiom da diferencoj estas inter la Barcelona kaj Amsterdama movadoj. Ne nur Esperantujo povas inspiri XR kun niaj rapidaj interlandaj kontaktoj, sed ankaŭ XR povas inspiri Esperantujon. Kun ĝia fokuso al mondaj kaj interhomaj povstrukturoj kaj ĝiaj regeneraj laborokutimoj, ni ĉiuj povus ion lerni de tiu ĉi apenaŭ dujaraĝa movado.

Retpaĝo de XR Nederland: extinctionrebellion.nl
Telegramgrupo XR Esperanto: [xr.telegramo.org](https://t.me/xr_telegramo)

Nel Overwater

Roterdamo, la 7-a de novembro 1922 - Zeist, la 31-a de julio 2020

Nel Overwater estis kompetenta reprezentanto de la angla sekcio ĉe FIPLV (internacia federacio de instruistoj de vivantaj lingvoj). Tamen eĉ ne-juna ŝi ne nur entuziasme studis Esperanton sed membriĝis en Esperanto Nederland (1993) kaj akceptis gravajn rolojn: por NGGE ŝi partoprenis la samjaran diskutkunvenon de nia asocio kaj NEJ pri la estonteco de Esperanto, sed jam en 1992 ŝi transprenis la kasistecon de Hans ten Hagen, malgraŭ preskaŭ 80-jara aĝo. Tion ŝi plenumis ĝis 1996, kiam Julija Batrakova ŝin anstataŭis. Sed pro sia socia engaĝiĝo ŝi krome prizorgis la administradon en sia aĝulejo, fondis ĥoron kaj instruis Esperanton (al plenkreskuloj i.a. per "Okuloj" de Stefan MacGill kaj la videofilmo

"Esperanto - Pasporto al la Tuta mondo" de Paul Gubbins.) Sed ankaŭ la nederlandan ŝi instruis al rifuĝintoj. Ni memoros ŝin kiel kleran, entuziasman membron, kiu ne rezignis eĉ invalidiĝinte rulseĝe viziti niajn kunvenojn.



Rob Moerbeek,
Estrarano Esperanto Nederland

Annie van Prooijen

La 12-a de septembro 1929 - 15-a de aŭgusto 2020

Mi ricevis leteron de Tiny Hammer, ke Annie van Prooijen mortis. Ŝi estis unu el la fidelaj membroj de la antaŭa Esperanto-klubo Zaandam.

Ineke Emmelkamp
Sekretario Esperanto Nederland

Vikipedio

Edmond Privat ne piediris al la unua kongreso

Skribita de Jos Wichmann



Tiuj, kiuj pristudis la historion de la esperanto-movado, sendube estas multaj, certe renkontis la svisan Edmond Privat. Li estis multsignifa homo en nia movado. Ekz. li faris multe da peno por diskonigi nian lingvon en multaj landoj, ankaŭ en Usono. Li partoprenis diversajn kongresojn. Mi citu Vikipedion: "En 1905 li, kiel 16-jara junulo partoprenis la unuan universalan kongreson en Boulogne-sur-Mer, kien li piede pilgrimis kaj kie li parolis kun matura elokventeco."

Antaŭ iom da tempo mi tajpis ĉe Jutubo

la nomon Edmond Privat kaj subite mi, je mia granda surprizo, aŭdis prelegon fare de Privat mem pri L.L. Zamenhof el la jaro 1954. Li diris en tiu prelego la jenon pri la Universala Kongreso: "Mi faris la unuan vojaĝon de mia vivo ekster Svislando por veturi al Bulonjo - ne piede, kiel rakontas la enciklopedio tute malprave - sed triaklase de la vagonaro."

Mi korektis tiun eraron en la Vikipedia paĝo. Mi ĉi-sube donas la ligan al la prelego, kiu cetere estas tre interesa: <https://youtu.be/8LLxrcjg5nQ>

Fajrobapto

La 25-an de julio ni ricevis leteron de Ans Bakker-ten Hagen el Amsterdamo.

Karaj Foppe-Klaas kaj Andries (ambaŭ Hovinga)!

Kun plezuro mi legis la unuan Fenikson kiun vi stiris. Vi sukcesis trovi kunlaborantojn kaj „plenigi” la membrogazeton kun interesaj artikoloj. Al Frank van Hertrooij kaj Marc Konijnenberg plej koran dankon pro la helpo al la Asocio. Ili tansprenis la redaktan taskon tuj post la subita, ne-atendita, forpaso de Piet Buijnsters. Tiu duopo apartenas al la junuloj kiuj igas ke mi ne dubas pri bona estonto por Esperanto tra la mondo. Vi, Foppe-Klaas kaj Andries, verŝajne apartenas al alia generacio. Sed vi pretas plu labori por ke la membroj de Esperanto Nederland sentu sin membroj de „unu rondo familia”. Per Fenikso ni konatigu la legantojn kun la lingvo kiu nin ligas: Esperanto.

„Komencantoj” kuraĝu esprimi sin en la internacia lingvo. Gravaj eraroj vi forigu ĉar ni ĉiuj - la legantoj -

ne estu misinformitaj pri la vorttrezoro aŭ la gramatiko. La verkanto de la originalo lernas (kiel ĉiu el ni) kiam vi prezentas bonkvalitan prozon. (Certe ankaŭ poemoj iam estos en via leterkesto.) Refojan dankon al vi. Sukcesan, aktivan plu-agadon deziras al vi.

Ans Bakker-ten Hagen.

Reago de la redakcio:

Kara Ans, Dankon pro la bondeziroj. Mi ankaŭ sendos vian mesaĝon al Frank kaj Marc. Ni ŝatas fari la revuon. Mi estas ankoraŭ komencanto. Per ĉi tiu laboro mi lernos la lingvon pli rapide ol antaŭe. Kaj gravas, ke ni havas bonan revuon. Multaj helpantoj helpas nin, kiel Marc Konijnenberg kaj Bert de Wit, por korekti la tekstojn, kaj Ineke Emmelkamp por trovi interesajn tekstojn kaj doni konsilojn. Kaj ni ne forgesu mencii la aliajn kontribuojn de niaj membroj.

Oni aprezas la reagojn de la aŭskultantoj

La 13-an de aŭgusto Jos Wichmann el Nimego sendis al ni la jenan mesaĝon.

Mi antaŭ multaj jaroj, foje volis aŭskulti la germanlingvan elsendon de la pola radio el Varsovio, sed mi eraris pri la tempo. Ĉar anstataŭ germanlingva parolado mi aŭdis tekstojn en lingvo kiun mi ankoraŭ ne konis, Esperanto. Poste mi decidis lerni tiun lingvon Esperanto, kaj kompreneble mi daŭrigis la aŭskultadon al la pola radio, tiam ankoraŭ per radioricevilo kiu ebligis la aŭskultadon per la mallongaj ondoj.

La malavantaĝo de tiuj mallongaj ondoj estis, ke ne ĉiam eblis senperturbe aŭskulti la elsendojn. Sed la tempo ŝanĝiĝis, kaj nun ni havas interreton. Mi volonte volus atentigi la legantojn de ĉi tiu revuo pri kelkaj nuntempaj interretstacioj, kiuj elsendas en Esperanto, kaj kiuj estas do bonege aŭskulteblaj. Mi havas sur mia iFono la apon podcast, (podkasto), kaj mi tajpis en la serĉilo esperanto, tiel mi trovis kelkajn esperantlingvajn staciojn, ekz. radio 3zzz el Aŭstralio (www.3zzz.com.au) Pola Retradio (www.pola-retradio.org) kaj Radio Havana Kubo

(www.radiohc.cu/eo) [Redakcio: kaj Ĉina Radio Internacia (www.esperanto.cri.cn)]. Kaj estas certe ankoraŭ pli da stacioj. Aŭskultu al ili kaj nepre rete sendu al ili laŭdon aŭ kritikmesaĝon. Ili volonte aprezas tion, ĉar konsciu tiel oni povas montri al siaj estroj ke indas disaŭdigi en esperanto. Estas bone por ĉiuj esperantistoj aŭskulte praktiki la internacian lingvon.

Ĉi-sube vi povas legi reagon de la parolistino de la aŭstralia radio el kiu montriĝas, kiel oni aprezas la reagojn de la aŭskultantoj.

.....

Jos Wichmann,

Saluton kaj koran dankon pro viaj kuraĝigoj. Ekscii ke aŭskultantoj ĝuas nian elsendon donas al Matt kaj mi energion por daŭrigi la laboron en tiu tempo de endomigo. Jam de marto ni ne rajtas iri al la studio por elsendi kaj renkonti unu la alian. Normale ni estas 6 teamanoj, sed pro la pandemio nur ni du provizas la programon.

Mi deziras al vi pliajn ĝojajn aŭskultadperiodojn. Franciska

La unua virtuala kongreso de esperanto

Bert de Wit partoprenis la Virtualan Kongreson de Esperanto (VK), kiu okazis de la 1-a ĝis la 8-a de aŭgusto. La kongreso estis reta evento organizata de UEA kaj teknike realigata de E@I. Ĝi okazis oficiale kadre de MondaFest' 2020. Bert esploris la avantaĝojn kaj malavantaĝojn de tiu virtuala renkontiĝo

Entute 1852 personoj aliĝis laŭ la listo de partoprenantoj! La programo daŭris preskaŭ ĉiujn 24 horojn de tago. Tio estas logika, ĉar oni vivas en diversaj kontinentoj kaj do diversaj horzonoj. Tamen la ĉefaj programeroj ofte okazis en eŭropaj tempoj. En la programo estis ripetaj diskutgrupoj por ekz.e kredantoj, ateistoj, ekologiemoj, hundoŝatantoj, samseksemuloj, Oomoto, k.s. Samkiel en "fizika" kongreso.

En la programo estis ekz.e prelegoj pri la Esperanto-Movado kaj la Ligo de Nacioj, aŭtoraj duonhoraj (ekz.e Federico Gobbo pri la libro de Claudio Magris), pri la lernado de dua lingvo, pri interplanedaj vojaĝoj (Kongresa Universitato), k.t.p. La tago de lernado okazis la 4-an de aŭgusto kaj al ĝi kontribuis diverslandaj fakuloj, ekz.e Mireille Grosjean, Katalin Kováts, Ilona Koutny kaj Federico Gobbo. Interesa programo!

Kompreneble en virtuala kongreso oni ne povas tuj renkontiĝi kun geamikoj kiujn oni ne vidis dum longa tempo, oni ne povis komune manĝi kaj trinki en restoracio, sed aliflanke estis plezuro revidi homojn per la interreto kaj babili kun ili en babilejoj. Okazis eĉ virtualaj ekskursoj tra diversaj famaj urboj. Kaj virtualaj koncertoj.

Mi notis kelkajn plusojn kaj minusojn pri virtuala kongreso ĉi-sube. Eble aliaj nederlandaj partoprenantoj povos aldoni siajn impresojn.

Plus-punktoj

- Partoprenantoj ne bezonas vojaĝi, elspezi multan monon por atingi la kongreson kaj ili indulgas la medion.
- Partoprenanto povas manĝi, trinki, k.t.p. dum la programo okazas en interreto. Oni povas facile kombini sian propran tagprogramon kun tiu de la kongreso. Oni povas partopreni kiam oni volas kaj oni povas spekti diversajn programerojn kiujn oni maltrafis poste ("spektaĵoj"). Eble oni metos tiujn poste en interreton. ILEI ekz.e havas specialan jutuban kanalon en kiu oni povas (re)vidi kongresprogramerojn.
- Partoprenis multe pli da homoj ol oni atendis. Tio estas fenomeno kiu okazas pli ofte: por la Nordamerikaj Kursoj de Esperanto aliĝis en 2020 trioble pli da homoj ol en antaŭaj jaroj.



Kiom da partoprenantoj ankaŭ efektive partoprenis? Ofte ne multaj, sed ne ĉiuj homoj estis liberaj dum tiu kongresa semajno. Dum prezentoj en la Internacia Kongresa Universitato oni vidis ke la nombro da partoprenantoj estis preskaŭ 90.

- La programeroj estis ĝenerale bone aŭskulteblaj kaj videblaj. Oni havis la impreson ke la parolanto rekte kontaktas vin. Ne estas fora podio sur kiu la parolanto sidas. Nur kelkfoje estis teknikaj problemoj. La unua prezento de Esperanto Nederland fare de Marko Konijnenberg okazis glate, sed la dua suferis pro teknikaj problemoj. Tiaj estas la komencaj malsanoj de nova maniero por kontakti, ni diru. Cetere la prezento estis bonega!
- Paroligaj lecionoj okazis ankaŭ dum la semajno sub la inspira gvido de Katalin Kováts. Kelkfoje lernantoj estis apartigitaj grupe por fari ekzercon. Do, lecionoj tute adaptitaj al la nuntempa situacio en multaj landoj.

Minus-punktoj

- Vidbabilejoj okazis ofte, sed ne ĉiam kun diskutgvidanto („moderato”). Post kelkaj tiaj programeroj oni ne plu havas emon partopreni. La abundo da tiuj programeroj kun vidbabilejoj indikas ke mankas aliaj programeroj kaj bonaj diskutgvidantoj. Mi povas imagi ke tio estas konsekvenco de la fakto ke nur malfrue UEA decidis virtualigi la kongreson pro la kronvirusa krizo. Do, komprenebla manko, sed en venontaj virtualaj kongresoj oni atentu pri tio. Prefere nur programeroj kun diskutgvidanto.
- La tuttaga programo evidente necesas pro la diversaj horzonoj de partoprenantoj. Mi havas >

Nederlandse Esperanto Jongeren in Onze Taal

Zoals in het vorige nummer van Fenikso Korine Cheizoo al liet weten, verscheen er in nummer 7 en 8 van Onze Taal een artikel over het Esperanto. Het blijkt een uitgebreid artikel van 3 pagina's te zijn geworden over het Esperanto, waarin enkele jongeren van NEJ (Nederlandse Esperanto-Jongeren), Marc Konijnenberg, Klara Ertl en Rogier Hurman, zijn geïnterviewd.

In het artikel vertellen de jongeren hoe ze met het Esperanto in aanraking zijn gekomen, Marc die drie jaar geleden nog niet eens wist wat het Esperanto precies inhield en er iemand over hoorde praten, en Klara, die met Esperanto is opgevoed.

In het kort wordt iets verteld over de taal, de letters en dat zij geen uitzonderingen heeft, een van de redenen waarom het Esperanto zo snel te leren is. Daarna vertellen de jongeren over de Esperanto cultuur, over de gebruiken die er zijn, zoals op Internationale bijeenkomsten een ander er op aan spreken dat ze in hun eigen taal praten, krokodili, en het La Bamba dansen, typisch een jongeren ritueel. Ook vertellen ze over de identiteit, die een wereld-identiteit is en dat relatief veel Esperantisten eenzelfde achtergrond hebben.

Het artikel eindigt met: „Het lijkt alsof het Esperanto het in zich heeft om tot een wereldtaal uit te groeien. Toch nam het succes snel af toen het Engels de dominante wereldtaal werd (...). Dat de taal overeind gebleven is, is beslist ook te danken aan een klein groepje jongeren.”

> *En daŭrigo al: La unua virtuala kongreso de Esperanto*

[Mi havas] la impreson ke la Azianoj kaj Aŭstralianoj estis malpli reprezentitaj en la programo pro la akcento je la eŭropaj horoj. Eble tio ŝanĝiĝos en la daŭro de la tempo.

- Oni bezonas teknike spertajn homojn por la glata funkciado de programeroj. Kaj oni bezonas disciplinon de la partoprenantoj (konata postulo en kronviro tempo).
- Mi mem notis ioman laciĝon pro la senĉesa sidado malantaŭ la komputila ekrano. Sed tio

estas mia aĝo, mi supozas.

Entute mi estas tre entuziasma pri ĉi tiu eblo virtuale kongresi per ikso.net (kaj jitsi.org) malgraŭ la teknikaj malfacilaĵoj kelkfoje. Mi esperas ke en venontaj jaroj ankaŭ okazos virtualaj kongresoj krom la, fizikaj kongresoj. Kaj ni kutimiĝu al tiu tekniko!

Venontjare oni fizike kongresos en Belfasto, Nord-Irlando kaj poste en 2022 en Montrealo. Ni esperu ke tiam ne plu estos problemoj pro la kronviruso. *

“De Esperantogemeenschap is mijn sociale fundament”

Hoe een groepje jongeren het Esperanto in Nederland overeind houdt



Toost op de toewijzing van het wereldjongerencongres aan de NEJ, spellefjesdag in Utrecht samen met een Esperantoclub in Duitsland, en de Nederlanders op het wereldjongerencongres 2019 in Slowakije.

In Nederland bestaat een aparte vereniging voor jongeren die actief bezig zijn met de kunsttaal Esperanto: de Nederlandse Esperanto-Jongeren (NEJ). Wat beweegt hen?

Even voorstellen Redacteur Andries Hovinga

Andries Hovinga (1969) en Foppe-Klaas Hovinga (1971) hebben per juni de redactie van Frank van Hertrooij en Marc Konijnenberg overgenomen. Andries stelt zich hier voor.

“Wil jij niet wat met Esperanto doen?” vroeg mijn broer Foppe-Klaas mij meer dan tien jaar geleden: “Jij bent een taalliefhebber en in bepaalde opzichten vind je er hetzelfde streven naar een beter begrip tussen de volkeren als in het oecumenische klooster Taizé in Frankrijk waar je vroeger veel geweest bent.”

“Ja ja, klinkt interessant”, antwoordde ik, “maar ik wil eerst nog mijn Poolse verbeteren.” In Taizé had ik begin jaren negentig mijn Poolse vrouw ontmoet en ik volgde toen samen met mijn zoon (die nu inmiddels 19 jaar is) Poolse taallessen in Groningen.

Toen kwam het moment dat ik in september 2014 het Drongo talenfestival in Amsterdam bezocht. Ik liep langs de stand van Esperanto Nederland en kwam er in gesprek met Esperantisten die boeiend over Esperanto vertelden, onder wie Ans Bakker. Zij gaf mij interessante foldertjes mee die ik in de trein onderweg naar mijn woonplaats Leeuwarden las. Na thuiskomst keek ik meteen op internet en ontdekte ik dat er in oktober 2014 een open avond was van Esperanto in Groningen. Ik ontmoette daar nog meer aardige, enthousiaste en ervaren Esperanto-sprekers. Ik leerde dat achter de mooie, goed opgebouwde taal Esperanto, behalve de interessante geschiedenis en het ideaal van Zamenhof, ook in deze tijd nog steeds een hele levendige wereld van Esperanto-sprekers steekt. Toen was ik definitief verkocht en besloot ik me op het Esperanto te storten.

Van Wil van Ganswijk kreeg ik o.a. het grammaticaboek ‘Tra la labirinto’ mee dat ik onder de Poolse kerstboom bijna in zijn geheel uitlas, gevolgd door het begin 2015 van Ineke Emmelkamp ontvangen Esperanto grammaticaboek van Roel



Andries in de Openbare Bibliotheek van Herzberg am Harz - 21 juli 2020 (foto: Zsófia Kóródy)

Haveman en Arjen-Sjoerd de Vries. Ik deed mee aan de studieweekenden van Esperanto Nederland en bezocht vele Esperanto bijeenkomsten in binnenland (onder andere bij IEI in Den Haag en UEA in Rotterdam) en buitenland (o.a. SES, UK in Slowakije en cursussen in Esperanto-stad Herzberg in Duitsland). Er ging letterlijk een wereld voor me open. De cursussen van o.a. Wil van Ganswijk, Bert de Wit, Katalin Kováts, Federico Gobbo en Zsófia Kóródy motiveren mij enorm om door te gaan.

Esperanto is de sleutel tot andere landen, culturen en talen. Het biedt de mogelijkheid (relatief goedkoop) te reizen en mensen uit andere landen écht te leren kennen. Ik hoop met mijn activiteiten voor Esperanto Nederland, de sociale media en dit verenigingsblad, bij te dragen aan het saamhorigheidsgevoel van de leden van Esperanto Nederland en anderen te enthousiasmeren ook Esperanto te leren.

O ja, tot slot nog iets over mijn overige activiteiten. Ik ben werkzaam geweest op het gebied van ICT, informatiemanagement en (digitale) archivering. Op dit moment help ik met het verbeteren van de geografische data bij de gemeente Leeuwarden. Verder sta ik als vrijwillig gastheer regelmatig in expositieruimte 'Obe' (podium voor literatuur, kunst en taal van Tresoar, de schatkamer van Fryslân).

De la estraro

En aŭgusto 2020 okazis la Virtuala Kongreso, anstataŭ la Universala Kongreso en Montrealo. Mi vidis multajn interesajn programojn, prelegojn, koncertojn! Dume mi kuiris kaj trinkis mian propran kafon! Tamen estas pli interese ĉeesti fizike. Kaftrinki kun aliaj homoj estas pli agrable ol tutsole!

Dum UK kutime okazas Movada Foiro. Esperanto Nederland kaj multaj asocioj povas reprezenti sin tie.

Ĉi-foje ĝi okazis virtuale. Marc Konijnenberg pretis aranĝi prezenton pri Esperanto Nederland. Li bonege faris. Li klarigis la katedron ĉe la Universitato de Amsterdam, montris bildojn de la retejo, filmetojn pri Fenikso kaj sociaj medioj (faritaj de Andries Hovinga), kantis Kajto, informoj pri Nederlanda Esperanto-junularo (NEJ) kaj ties KKPS. Kelkaj estraranoj partoprenis en tiu prezento kaj respondis al pluraj demandoj.

Dum la ferma kunsido de la VK mi aŭdis du novaĵojn.

Unu el niaj docentoj dum studsemajnfinoj estas diplomita kiel elstara aganto por Esperanto: Yves Nevelsteen (Belgio) pro elstara kunlaborado en pluraj retaj agadoj (Eventa Servo, Vikipedio, Komputeko), starigo de la fonduso Instigo-Liberapay, Esperanto-traduko de retejoj kaj programoj kaj aliaj projektoj, kiel Eksterrete kaj kolekto de markoj en Esperanto.

Rekone al la unika valoro, vasteco kaj persistemo de lia agado kadre de UEA, la Estraro proponis Humprey Tonkin elekti kiel Honoran Prezidanton – postenon, kiun li verdire jam okupas en la koroj de la membraro. Pli pri sinjoro Tonkin aperis en la Gazetara Komunikado nr-o 897 de UEA (gk@co.uea.org).

La komitatkunsido komenciĝis. Nia komitatano A, Marc Konijnenberg, informis nin ke li estas elektita en la nova Elekta Komisiono por UEA. Ni deziras al li sukceson en tiu ĉi ne tro facila laborkampo! Lee Miller publikigis ke Marc ekde nun partoprenos en Duolingo en la grupo de spertuloj, kiuj bone scias kaj uzas la lingvon. Marc nun rajtas respondi al #KOR-demandoj.

En 2020 Unuiĝintaj Nacioj festas sian 75-jariĝon, tamen en periodo de grandaj defioj, inkluzive de la plej malbona tutmonda sano-krizo en sia historio.



Ĉu ĝi alproksimigos la homojn kaj la landojn unu al la aliaj? Aŭ ĉu ĝi kondukos al pli grandaj dividiĝoj kaj malfido? La opinioj de la tuta mondo povas fari diferencon en la agado de UN, kaj tial estis lanĉita la enketilo en diversaj lingvoj. Esperanto estis akceptita kiel unu el la laborlingvoj por la agado de UN ĉirkaŭ la enketilo "UN75 2020 kaj plu". "La mondo bezonas solidarecon", "via kontribuo gravas", diras UN en la oficiala retejo www.un75.online, i.a. en Esperanto. UEA esperas, ke la partopreno de esperantistoj portos la necesan diversecon al la respondoj de tiu enketilo.

La organizantoj de la studsemajnfinoj decidis organizi unu posttagmezon kun kursoj en du niveloj. Ĝi okazos la **21-an de novembro 2020** en Amsterdamo. Atentu: ne estas reta kurso! Pli da informoj aliloke en tiu ĉi Fenikso.

Lasta mencio estas denove pri nia jarkunveno, kiu devus okazi en majo 2020. La viruso malebligas tion. Ni nun planas la jarkunvenon la **7-an de novembro 2020**, en la ejo 'Vergadercentrum Vredenburg', Vredenburg 19, 3511 BB Utrecht. La tagordo kaj diversaj dokumentoj estas en Fenikso nr-o 2 (marto/aprilo 2020). Depende de la situacio ni aldonas necesajn punktojn. Ni informos vin pe la retejo kaj Fenikso. Vi estas bonvenaj ekde la 13-a horo, la kunveno komenciĝos je 13:15, ĝis maksimume la 16.30a horo. Ni organizas nur la kunvenon sen aldona programo. En la salono povas esti maksimume 30 homoj (laŭ la 1,5m regulo). Vi nepre anoncu vian ĉeeston al la sekretario. Venu nur se vi sentas vin bone.

Sekvu la anoncojn en la retejo kaj venontaj Feniksoj. Ja povas esti ke la situacio koncerne la kronviruson ŝanĝiĝos.

Ineke Emmelkamp
La 12-an de aŭgusto 2020



Revuo-interŝanĝo de Alfonso Pijnacker

Alfonso ricevis diversajn numerojn de gazetoj kaj legis ilin. La plej legindajn artikolojn li selektis por vi. Se vi interesiĝas pri tiuj ĉi artikoloj aŭ gazetoj, reagu al lia retpoŝtadreso: a.pijnacker@simpc.nl kaj li sendos ĝin al vi.

Lasu min komenci tiun ĉi rubrikon pere de gratuloj al TADEN. Gratulojn meritas "Tutmondan Agadon De Esperantistaj Nefumantoj" pro 25-jara agado por puraj pulmoj, certe por nefumantoj, kiuj ofte devis, kaj ankoraŭ devas, suferi la malutilajn efikojn de tabakfumo. Sendube tiu kontraŭbatalo kontribuis al nuntempaj fummalpermesoj en restoracioj, trajnoj, aŭtobusoj kaj aliaj publikaj lokoj. Se vi ŝatas ekhavi la lastan novaĵleteron de TADEN, skribu al moerbeekr@gmail.com.

En la antaŭa Fenikso-numero mi disponigis la libron "Ĉiutaga vivo tra la Mondo" kaj mi feliĉe spertis ke minimume unu el niaj membroj legis mian rubrikon. Pere de tiu leginto la libro vojaĝos al Tanzanio. Vere, same kiel homoj, libroj povas migri de unu kontinento al alia.

Nu, mi rakontu pri la paperaj revuoj kiujn lastatempe mi ricevis. Mia poŝtkesto ne pleniĝis kiel vi povas konstati.

Esperanto, numeroj 1347 - junio 2020 kaj 1348 - julio/aŭgusto 2020.

Sub titolo "Afriko brilas" Adjévi Adje skribas ke natura katastrofo en aprilo 2020 grandskale damaĝis la urbon Uvira, nordoriente en DR Kongo. Torentaj pluvegoj kaŭzis terurajn inundojn. En Uvira loĝas aktivaj esperantistoj. Oni povas donaci al konto "Espero" ĉe UEA kun la celo "Uvira-20".

Pri UEA oni povas tede juĝi, sed, dum mi legis la estraran raporton pri 2019 mi solece aplaŭdis por ĉiuj fervoruloj inter ni. La asocio ja meritas membrecon de ĉiu esperanto-parolanto. UEA, ja ege malgranda internacia asocio, multe faris.

Se vi kutimas krei E-sloganojn, vi certe legu la artikolon "Meditoj pri slogano" de Stefan MacGill. Bona slogano devas esti mallonga, klara, trafa.

Kion aŭdanto aŭ leganto komprenas ĉe la frazo ke Esperanto estas simpla aŭ neŭtrala? Eble ni kontrolu nian propagandan materialon.

Intertempe ni konsciiĝas ke pro la pandemio nia tuta movado iras virtuale.

La Revuo Orienta, numeroj 4 aprilo 2020 kaj 5 majo 2020.

Ene estas artikolo de Aleksandra Watanuki pri sia verko "Mondo en Guto. Ne nur pri lingvoj ŝi spertas sed ankaŭ pri fotado. Por pli konatiĝi kun ŝi iru al Fejsbuko. Plaĉas al mi ĉiam la tipaj desegnoj, el kiuj kelkaj aldoniĝas.

Bedaŭrinde mi ne komprenas la japanan lingvon, do la revuo estas grandparte senutila por mi.




Sennaciulo, numeroj 1379-1380 majo-junio 2020 kaj 1381-1382 julio-aŭgusto 2020

Ĉeftemo, kompreneble, estas la kronviruso. Unu el la interesaj artikoloj rilatas al ekologio kontraŭ pandemio. Ankaŭ ĉi-lande estas diskuto pri la danĝeroj de la industria bredado de bestoj.

Vi scias, ke la revuo estas la organo de SAT (Sennacieca Asocio Tutmonda), do regas politikaj ideoj kaj komentarioj. Mi legis pri sindikato, revolucio, kapitalismo, ktp.ktp. Trafis min ke la Nederlanda Volkskrant anoncis ke nuntempaj studentoj pli kaj pli interesiĝas pri Karl Marx dum Sennaciulo mencias la revigliĝo de la Komunista Frakcio en SAT. Verŝajne pro la samtempaj grandaj krizoj ni nun transiras al nova epoko.

Fine, se vi ŝatas ricevi nomitajn revuojn, ne hezitu skribi al a.pijnacker@simpc.nl

Het Fries krijgt te weinig aandacht



Herman Deceuninck attendeerde ons op het volgende nieuws.

De visitatiecommissie die in opdracht van de Raad van Europa heeft onderzocht of Nederland zich houdt aan het *Handvest voor regionale talen of talen van minderheden* schrijft dat de Nederlandse overheid er voor moet zorgen dat het vak Fries veel meer lestijd krijgt en veel meer als voertaal bij andere vakken wordt gebruikt. De Nederlandse overheid heeft volgens een

bepaling zich er in 1992 toe verplicht om het Fries te bevorderen, maar ze houdt zich daar niet aan.

Ook andere inheemse talen, zoals het Limburgs, Jiddisch, Romanes en Nedersaksisch moeten volgens de commissie meer aandacht krijgen; eveneens zou onderzocht moeten worden of het Bildts en Papiaments een officiële erkenning kunnen krijgen.

Bron: <https://www.neerlandistiek.nl/2020/08/nederland-krijt-weer-onvoldoende-voor-fries-op-school/>

Lernu per la angla - aŭ tamen ne?

Originala teksto verkite de Frans van Heest - Resumita kaj tradukita de Bert de Wit

Pro anglalingva instruado en la universitato studentoj pri psikologio en la Radboud universitato (Nimego) ekhavis malpli bonajn rezultatojn ol iliaj kolegoj kiuj sekvis nederlandlingvan instruadon.

Tio estas la rezulto de esploro farita de la fakultato pri Psikologio kaj la Internacia Max Planck Esplorinstituto inter unua-jaraj studentoj pri psikologio.

En la nederlandaj amaskomunikiloj regule aperas sciigoj kiuj pretendas ke la kvalito de la instruado suferas pro la uzado de la angla kiel instrua lingvo. Oni ankaŭ povas legi pri studentoj kiuj kritikeme prijuĝas siajn docentojn pro ilia regado de la angla en sia fako. Sed pri la efiko al la studorezultatoj malmulto estis konata.

La emerita profesoro pri eksperimenta lingvopsikologio Annette de Groot, en sia adiaŭa prelego diris ke ne instrui en la nederlanda postulas kroman fortostreĉon. Ŝi opiniis tion sufiĉa kialo por supozi negativan influon sur la pritrakto de informoj kaj la transdono de scioj en la instruado.

Ekde 2016 la kurso pri Psikologio ĉe Radboud Universitato estas kaj en la nederlanda kaj en la angla. La du variaĵoj estas identaj, nur ne la lingvo uzata kaj malgranda parto de la studomaterialo. Bela kazo do por studi la efikon de la instrulingvo.

Studentoj povas mem elekti la lingvon en kiu ili volas esti instruataj. La esploristoj kalkulis pri tio ke la pli motivitaj studentoj kaj tiuj kun pli bonaj rezultatoj elektu la anglalingvan kurson, kio povus influi la studorezultatojn.

Tial oni esploris ĉu ĉe la komenco de la studo

ekzistis jam diferencoj. Oni komparis la mezajn poentojn de la lernefina ekzameno, sed ne trovis diferencon. La esploristoj ankaŭ konsideris la ekzamenajn poentojn pri la angla lingvo. Tiel ke ambaŭ grupoj havis kompareblajn poentojn pri la angla lingvo.

Nederlandlingvaj studentoj kiuj elektis la anglalingvan instruadon havis iom pli altajn poentojn pri la angla, kio ne estis surprizo, ĉar studentoj kiuj relative malforte regas la anglan lingvon, ne preferas studi anglalingve. Tial oni en la esploro komparis nur studentojn kiuj havis kompareblajn finekzamenajn poentojn pri la angla.

Statistike signifa diferenco

Nederlandaj studentoj en la nederlanda kurso dum la unua jaro meze atingis 7,2 poentojn kaj la nederlandaj studentoj en la anglalingva kurso atingis meze 6,7 poentojn. Statistike signifa diferenco. La diferencoj kun la germanaj studentoj kiuj sekvis la nederlandlingvan aŭ anglalingvan kursojn ne estas signifaj. El antaŭaj esploroj jam oni scias ke studentoj pli bone enkapigas informojn se tiuj estas provizataj en ilia "unua" lingvo. Alia klarigo povas esti ke la instruado en la angla estas malpli bonkvalita. Surbaze de siaj esplorrezultoj la esploristoj diras ke ili ne povas diri ke la unua klarigo estas pli adekvata ol la dua.

Se oni konsiderus la forigon de la anglalingva instruado, tio signifus drastan ŝanĝon de la universitata politiko. Sed aliflanke la universitato bonvenigas eksterlandajn studentojn pro la sistemo de financado de la universitato kaj la universitato ankaŭ bonvenigas internacian instruadon.

Laŭ Science Guide, la 9-an de julio 2020.

<https://tinyurl.com/yc37ozma>

Generaals zonder leger

Gekaraj,
Dat de Esperantobeweging geen bloeiende tijd doormaakt, hoeft geen betoog. Al decennia roep ik (in de woestijn) vanuit mijn bedrijfskundige achtergrond, dat het zonder een goede marketing niets wordt. Marketing is ook nodig om te zorgen dat het Esperanto en zijn beweging een goede reputatie genieten. En daaraan ontbreekt het nogal. Wat de taal zelf betreft is dat niet eens zo slecht, maar toch.....
Werd het Esperanto in de jaren 60 van de vorige eeuw in ons land positief bejegend, nu is het eerder meewarig. Anders is dat bij de Esperanto-beweging. Niet voor niets is de spreekwijze ontstaan "Esperanto vivas malgraŭ la Esperantistoj". Zijn Esperanto-bonzen ziende blind?

Daar moest ik aan denken in de boekenweek, toen ik mij het boekenweek-essay 'Generaal zonder leger' van Özcan Akyol eigen maakte. Hierin onderzocht hij waarom de literatuur steeds meer genoegen moet nemen met een rol in de marge. Dat speelt bij ons ook. Al lezende begon ik parallellen te zien met de Esperanto-wereld. Akyol constateert dat de vele schrijvers als generaals menen dat zij vandaag de dag het grote publiek aanvoeren en met hun boeken iets teweeg te brengen. Ten onrechte; ze slaan nog geen deuk in een pakje boter, aldus de schrijver. Het boekje doorlezende zie ik die generaals ook rondlopen in onze Esperanto-wereld. Net zo als die schrijvers zich onbewust van het ontbrekende leger. Enkele voorbeelden, die ik in het Esperanto weergeef t.b.v. een discussie buiten onze taalgrens, aangezien de Nederlandse tekst zich al laat lezen in 'Generaal zonder leger'.

Blz.35: Librozentadoj flosas sur fosilo de nostalgio kaj pasintaj opinioj dum nuntempe estas tiom da aliaj eblecoj danke al sociaj

medioj. Blz.36: Ĉi ĉio ne aplikiĝas je la literaturo.

Anstataŭigu 'libro' kaj 'literaturo' per 'Esperanto'.

Blz.52: Senarma generalo. Iu kiu staras sur podio senĝene kaj klarigas sian batalplanon dume neniu aŭskultas. Kiu ne rekonas tion?

Blz.60: Jen refoje tasko por la homoj kiuj atribuas varman koron al la literaturo. Sendu kurson al tiuj timemaj aŭtoroj en kiu ili lernas memfide stari antaŭ grupo de infanoj, kiel komizo kiu penas vendi sian vararon kaj komercon. Jen pledo por merkato.

Blz.63: Kion ni bezonas, en la intereso de la literaturo en kiu ajn manifestado, estas junaj aŭtoroj kiuj kvitiĝas pri la klasikaj diktaĵoj de polvigitaj akademianoj, eldonistoj, recenzuloj kaj verkistoj kiuj superkreskigas la libropejzaĝon kiel obstinaj ŝimspecoj, kiuj ja ne volas cedi. Necesas ribeluloj kaj spitemuloj en niaj publikaj debatoj, loĝejpreparistoj kiuj reinventas la disvastigon de libroj kaj enhance sin forturnas de gregsintho, unu el la plej grandaj plagoj de la nuntempaj literaturuloj.

*Refoje:
literaturo = Esperanto.
Junaj aŭtoroj = junaj Esperantistoj. Polvigitaj akademianoj.... = polvigitaj akademianoj, estraranoj, veteranoj ktp.
Libropejzaĝo = Esperantujo.
Disvastigo de libroj = disvastigo de la internacia lingvo.
Nuntempaj literaturuloj = Esperanto-personegoj. Loĝejpreparistoj estas ankaŭ tiuj kiuj profesie kaj insiste koridorumas (= lobbyen) ĉe la, por ni, utilaj instancoj.*


Bovenstaand is niet als verwijt bedoeld, maar eerder als een (in goed Esperanto) wake-up call. Een en ander is in de loop der tijden zo gegroeid, bepaalde ego's hebben er hun plek gevonden. En dit leidt o.a. tot een allerminst florerend UEA. Wil de Esperantobeweging enigszins succesvol zijn, dan moet het roer om.

'Generaals zonder leger' kan een leidraad zijn om een aanzet hiertoe te geven. En dat is ook de enige reden waarom ik dit epistel in het Nederlands heb geschreven. Het essay is nu eenmaal niet vertaald in het Esperanto of een andere taal. En waarom zou Esperanto-Nederland niet het voortouw kunnen nemen dit onderwerp eerst landelijk en dan internationaal aan te zwengelen? Dit land is al vaker vruchtbare grond voor Esperanto-initiatieven geweest. Denk aan de wereldberoemde Nijmeegse schriftelijke cursus, de oprichting van TEJO, idem van IL (later IEI en ILEI), Esperanto-Domo (Presikhaaf), de activiteiten van Willem Drees, Andreo Cseh, Pragano, Fam. Isbrücker, Theo Jung, Faulhaber, de lancering van de Stelo, de vestiging van UEA in Rotterdam, de UvA-leerstoel enz. enz.

Ik hoop dat de uitdaging binnen Esperanto-Nederland wordt opgepakt en de modernisering van de Esperanto-beweging wordt aangezwengeld. Zou het niet leuk zijn als Özcan Akyol de aanleiding zou zijn van een reviviĝo de la internacia lingvo in een nieuwe structuur? Hoe doe je dat en wat doe je dan? Daar moet nou net die discussie over gaan en vergeet dan vooral de jeugd niet. Ik heb het in het verleden meer-malen geprobeerd maar toen was de tijd er kennelijk niet rijp voor binnen Esperantujo. Hopelijk nu wel, maar ik voel me er nu te oud voor en geef de pijp graag aan Maarten. Do, Maarten kie vi estas?! Je kunt natuurlijk ook dit epistel in de onderste la gooiën en er niets mee doen, of moderner X aanklikken en alles verwijderen. Dan weten we zeker dat de dalende lijn die Wim Janssen ons zo'n 2 decennia geleden voorschotelde, zich, in niets gehinderd, zal voortzetten en de Esperanto-movado echt marginaal wordt. Graag ontvang ik opmerkingen, commentaar, visie, kritiek.

Ik wens eenieder die zich aangesproken voelt, veel wijsheid, Doorzettingsvermogen en succes.
Kore salutas, Kees Ruig, Malden.

Amaskomunikado



Marc in Fris!

Op 26 juli was Marc Konijnenberg kort te horen op Radio 1 bij Fris!, een programma van KRO-NCRV.

Aanleiding voor dit gesprek was dat in 1887 op die dag het Esperanto middels een boekje van 40 bladzijden werd gepubliceerd.

Eerst is een Esperanto-cover van het lied *Hello* van Adele te beluisteren. Marc vertelt waarom het Esperanto door de 2e Wereldoorlog te lijden heeft gehad, maar er nu zeker hoop is.

Je kunt interview terug beluisteren/kijken op:
<https://www.nporadio1.nl/fris/onderwerpen/62379-2020-07-26-wordt-esperanto-ooit-de-nieuwe-wereldtaal>

Interview in Arnhem

Eind juli had Marc Konijnenberg ook een interview in zijn woonplaats Arnhem. Martijn van Butselaar, alias De Stadskok, interviewde hem over zijn internationale activiteiten rondom Esperanto. Het artikel werd geplaatst op de Facebook pagina van De Stadskok (753 volgers). De Stadskok promoot streekproducten en probeert voedselverspilling tegen te gaan.

www.esperanto-nederland.nl/ned/nieuws.php#245
www.facebook.com/De-Stadskok-1917795538256241/



Amikumu estas poŝtelefona apo, kiu helpas uzantojn trovi proksimajn samlingvanojn kaj interrilati kun ili. La servo estis lanĉita en 2017 kaj nun havas pli ol 20 000 membrojn, el kiuj du trionoj estas esperantistoj. Post kelkaj jaroj de programado, Amikumu petas vian helpon sekurigi sian financon fundamenton. Tio certigos, ke nia servo daŭros longe estontecen.



Ĉuck Smith, kunfondinto kaj teknikestro de Amikumu, antaŭa kunlaboranto de Duolingo por Esperanto, fondinto de Vikipedio en Esperanto.

Dum kronvirotempo, esperantistaj kongresoj plejparte ne okazas. Eble vi ankaŭ timas renkontiĝi grandgrupe en homplena trinkejo. Sed ĉu vi ankoraŭ volas ekzerci vin pri Esperanto? Per Amikumu, vi povus renkonti aliulon (ekzemple vojaĝanton) por babili esperante en via urbo, aŭ simple kun aliaj esperantistoj rete babili se ankoraŭ

tro danĝeras por renkonti aliulojn en via regiono.

Se vi estas senpaga membro, ni kuraĝigas al vi kontribui al Amikumu nun, tiel helpante kreskigi nian komunumon kaj plufunkciigi niajn servilojn. Nia komenca celo estas 500 novaj oraj membroj.

Dum la ĵusa IJK Amikumu lanĉis kampanjon por varbi novajn orajn membrojn kaj tiel financi reprogramadon de la tuta sistemo. La nova versio havos plene malferman kodon, rakontas Chuck Smith, la ĉefa teknika oficisto de Amikumu.

<https://app.amikumu.com/orighu>

Fonto: artikolo publikigita en 'Libera Folio' la 27-an de julio 2020

Roterdamo 2020

Dum la pandemio la verkisto iris en sian kelon kaj trovis lukon neniam viditan antaŭe. Li falis al la jaro 4020 kaj renkontas Fobo-n: malgranda, senhara, estulo. La socio kaj scienco ŝanĝiĝis, sed ĉu ĝi pliboniĝis? Legu pli de la rakonto ..

Fobo: Stulta homo, aŭ kiel diras niaj scienculoj Homus Stultus, ĉu vi en momento bezonas pli ol 4 kvadratajn metrojn?

Mi: En la momento ne, sed kiam ekzemple mi estas hejme, mi bezonas kuirejon, necesejon, sidĉambron, dormoĉambron, banejon ktp. ktp.

Fobo: Kaj ĉu vi povas samtempe esti en ĉiuj tiuj lokoj, Homus Stultus, aŭ sinjoro (ri denove laŭte ridis) Sono Mobo, diru, ĉu vi ankoraŭ vere ne komprenas?

Mi: Kion?

Fobo: Ke havi urbon, domon, aŭton, monon, apartan landon, apartan lingvon, apartan religion, apartan sekson, kaj samajn stultaĵojn, kaŭzas malfeliĉon? Ĉu vi ankoraŭ ne komprenas ke tiaj aferoj kaŭzis vian ekstermiĝon? Kiom taŭga estas por vi la nomo Homus Stultus ha-ha!

Mi: Kial?

Fobo: Tutsimple, ĉar la samon volas aliaj homoj! Kaj tio kaŭzas batalojn, Homus Stultus.

Mi: (kolere) Stulta estas vi, via patro, via patrino...

Fobo: (mokride) Noĉ, noĉ, noĉ, patro kaj matro! Patrino estas diskriminacia vorto. Ĉu vi ne scias ke ni korektis vian komunan lingvon?

Mi: Neniu rajtas tuŝi la fundamenton...

Fobo: Ha-ha-ha... Vi vere estas bona modelo de Homus Stultus. Tamen mi efektive savis vian vivon. Baldaŭ vi komencos iĝi Suhomo. Vi eliros el la stulteco de Homus Stultus.

Mi: Sed mi volas resti homo. Mi sopiras nostalgie al mia domo, al mia urbo kun ĝiaj kafejteroj, mia familio, mia...

Fobo: Mia, mia, mia, nia, nia, nia, mi, mi, mi, ni, ni, ni... bonan vojaĝon, sed ne sen mi ha-ha-ha!

Mi perdis mian paciencon kaj serĉis ion, ŝtoneron, globon, terpecon, vergon aŭ ion similan por ataki rin, sed ri, certe leginte mian menson, supreniris al la ĉielo kaj ŝvebante en la aero, super mi kaj for de mia atingo, komencis pli laŭte ridaĉi. Post la satridado en la aero, ri malsuprenvenis kaj per tute serioza kaj logika paroltono daŭrigis:

- Bone aŭskultu min kara Sono, vi estas elektita kompreni aferojn kiujn ne facile komprenas aliaj anoj de Homus Stultus. Ili komencis mortigi

unu la aliajn pro bagatelaj aferoj, ili, pro tute egoismaj kialoj, malpermesis al unu la alia ĝui la vivon. Dum la malavara Tero donus al ĉiuj homoj sufiĉajn rimedojn por feliĉigi ĉiujn, kompreneble se

ili kunlaborus harmonie. Ili komencis batali kontraŭ la naturo, dum la naturo longtempe tre noble toleris. Vi, homoj, faris supozajn kaj fantaziajn dispartigojn sur la surfaco de Tero kaj nomis tiujn partojn mia/nia lando, mortigis aliajn homojn nur pro tiaj viaj fantazioj. Vi faris en viaj kapoj dogmojn, kiujn vi nomis kredo, kaj pro tio vi mortigis unu la alian. Antaŭ 2000 jaroj, t.e. en la jaro 2020, de kiam vi venas...

Mi: Stulta estas vi mem. Ne konsideru min stulta. Ĉu mi vojaĝis 2000 jarojn dum kelkaj sekundoj?

Fobo: Jes, kara Sono. Vi vojaĝis tra 2000 jaroj, sed ne dum kelkaj sekundoj. La koncepto de la tempo nun estas io alia ol tio, kio estas en via menso. Mi klarigos al vi kiam vi fariĝos Suhomo. Nun vi ne povas kompreni. Krome, mi ne havas ekkolersenson. Mi ne ekkoleras se vi insultas min. Kion ajn vi diras estas aŭ prava aŭ ne. Se vi pravas, mi ekpensos. Se vi ne pravas, mi ekridos por amuziĝi. Kolero elvenas el malscio. Mi scias multon pri vi. Vi scias nenion pri mi kaj eĉ ne demandas. Ĉu vi ne volas koni min?

Mi: Sed mi estas kolera. Mi estas homo. Mi hatas vin. Mi volas reveni hejmen.

Fobo: Ĉu vi volas reveni al 2000 jaroj antaŭe?

Mi: Jes, ĝuste tien kie mi estis kaj tiamen kiam mi estis.

Fobo: Kio se mi erare sendos vin al 500 jaroj antaŭ 2020?

Mi: Katastrofo. Tio estos la jaro 1520. En tiu jaro flamadis absurdaj hommortigoj nome de religio. Estis jaro de malscio kaj kruelaĵoj...

Fobo: (forte ridinte) Ĉu mi ripetu viajn vortojn aŭ vi mem kapablas kompreni kion vi diris. Reveni al 1520 ĉe vi estas katastrofo. Same ĉe mi estas reveni al 2020. Tutsimple. Ĉu vi komprenas?

Mi: Jes, sed la evoluo devas okazi adaĝe, laŭtempe, ŝtup-post-ŝtupe...

Fobo: Ĉu vi havas ideon kiom longe mi devas atendi vian evoluon?

Venontfoje la daŭrigo de la rakonto.

Rakonto verkita de Saïd Mozaffari

Invito al reta festo

90-a datreveno de IEI



Julia Isbrücker kaj
Andreo Cseh

IEI, kiu havas sidejon en Hago, baldaŭ festos sian 90-an datrevenon.

La **12-an de septembro 2020**, inter la 11.00 kaj 17.00 horoj, okazos ĉe Internacia Esperanto-Instituto reta renkontiĝo okaze de la 90-a datreveno de IEI.

La 12-an de septembro 2020 ni festas ankaŭ la 125-an naskiĝdatrevenon de Andreo Cseh. Kune ni lernos pli pri IEI, Andreo Cseh, Julia Isbrücker, Cseh-instruado kaj kompreneble Esperanto pere de diversaj prelegoj dum la tago.

Vi trovas la programon en la retejo de IEI: www.iei.nl/nl_nl.



Kongresoj



Neniam antaŭe tiom da homoj partoprenis IJK Nova nivelo de reta renkontiĝo

Fine de aprilo estis definitive – IJK (la Internacia Junulara Kongreso de Esperanto) devos realiĝi en la interreto. Sed kion signifos tio? Tion sciis nek ni, organizantoj, nek la partoprenantoj. En la sekvaj du monatoj okazis multe da decidado kaj planado pri io antaŭe nekonata. Efektive, eĉ tagon antaŭ IJK, ne estis tute klare kia ĝi estos. Nun, post la kongreso, mi povas konstati ke ĝi estis mejloŝtono en pluraj manieroj.

IJK 2020 montris la potencon de reta evento. Se vi ĉeestis regulajn unuhorajn skajpalvokojn kaj imagis ke IJK estos simila, vi subtaksis ĝin. La etoso dum la babilado estis malstreĉa kaj amika, kvazaŭ la partoprenantoj konis unu la alian jam de longa tempo. Ĉi tiu IJK, same kiel ĉiu alia, estis intensa sperto. Per la programo kaj la platformo en kiu ĝi okazis, kreiĝis sento de komuneco. La 80 programeroj provizis temojn por preparoli kaj inspiris al internaj ŝercoj. Ĝuste la bonega etoso surprizis kaj partoprenantojn kaj organizantojn.

Mi kuraĝas aserti, ke kun siaj 316 partoprenantoj el 52 landoj, la reta IJK estis la plej internacia iam ajn. Por la unua fojo en historio, filipinano partoprenis en IJK, kaj fakte ne nur unu, sed dek tri! Tio estas nur unu ekzemplo. Estis programkontribuantoj el Novzelando, Barato, Ĉinio, Benino, Togolando, Burundo, Germanio, Britio, Usono kaj Brazilo por nomi kelkajn. Tiu internacieco estis samtempe defio por ni organizantoj kaj la teĥnikistoj, kiuj ĉiuj vivas en Eŭropo, pro la 20-hora gamo de tempozonoj.

La kongreso estis pionira reta renkontiĝo en grandeco kaj internacieco. Mi defias vin trovi similan ekzemplon, eĉ ekster Esperantujo. Kio sekvos? Mi scias de klaĉoj ke estas volo organizi semajnfinan retan renkontiĝon, kaj laŭ nia enketo 4 el 5 partoprenintoj plej verŝajne partoprenus denove. Mi forte kredas ke ni ne vidis la finon de grandaj retaj junularaj renkontiĝoj!

Antonia Montaro el Svedio
Originale verkita por Kontakto, revuo de TEJO



De VN 75 jaar

Door Rob Moerbeek

“Nooit meer oorlog!”, besloten de oorlogsmoeë landen in 1945 na het verlies van 19 – 25 miljoen militairen en 14-47 miljoen burgers; nauwkeurige cijfers zijn alleen geleverd door Duitse bureaucraten:

6 miljoen joden, 6 miljoen zigeuners, homo's, gehandicapten, politieke tegenstanders.

Al in 1942 bespraken 26 landen een wereldorganisatie. Zodoende is in 1945 de naam “Verenigde Naties”, voorgesteld door pres. Roosevelt, aanvaard. Het Handvest en de Universele Verklaring van Mensenrechten zijn al officieel in het Esperanto verschenen.

In democratische trant heeft elk land in de Algemene Vergadering één stem, aanvankelijk 51, na aansluiting van voormalige koloniën 193. De zittingsperiode duurt de hele herfst. Besluiten worden bij twee derde meerderheid genomen.

Voor veiligheid en vrede moet de Veiligheidsraad zorgen, bestaande uit vijf permanente leden met vetorecht (China, Frankrijk, Rusland, het Verenigd Koninkrijk en de Verenigde Staten) en 10 andere landen die twee jaar zitting hebben. In de eerste plaats worden conflicten vreedzaam via onderhandelingen opgelost. Maar er doen zich gevallen voor waarbij “Blauwhelmen” moeten optreden, hoewel niet overal gerespecteerd. Pas na de genocide in Rwanda kwam “Het recht van verdediging” ter sprake. De Sociaal-Economische Raad (ECOSOC) is voor ons van bijzonder belang, want behalve zorg voor UNICEF (kinderfonds) en UNHCR (vluchtelingen) laat deze ook ngo's vergaderen, zoals UEA (de Wereld Esperanto-Vereniging) en TEJO (Wereld Esperanto-Jongeren Organisatie); hun missie is opkomen voor de taalrechten van minderheden: dat verhoogt het aanzien (dankzij de diplomatieke activiteiten van Rakoen Maertens).

De Algemeen Secretaris werkt met duizenden ambtenaren (“bureaucratie” was het verwijt, maar een metropool als New York heeft er zelf nog meer). Dag Hammerskjold is omgekomen bij een bezoek aan Congo. Niets ontziende mijnbouw-ondernemers worden hiervan terecht verdacht.

Over de educatieve, wetenschappelijke en culturele Unesco worden we goed op de hoogte gehouden door brochures en de “Unesco-Koerier” die sinds 2017 in Esperanto verschijnt. Maar ook voor het algemene publiek bestaat de Unesco-bibliotheek (bij EMMA in

Utrecht) en het kwartaalblad UN-Forum van de Nederlandse Vereniging voor de Verenigde Naties (NVDN).

In Den Haag hebben we het Vredespaleis met het Internationaal Gerechtshof, maar ook het Internationale Strafhof, dat niet erkend wordt door de “democratische” VS, die zelfs met een invasie dreigen mocht een Amerikaanse militair hier terechtstaan. Van belang zijn de Wereld-Voedsel- en Landbouworganisatie en de Wereldgezondheidsorganisatie, waarvan de richtlijnen (bijv. over tabak) door de Europese Commissie worden overgenomen en via deze door landsregeringen.

Het is eigenlijk een groot wonder dat de VN met een erg krap budget erin geslaagd zijn te midden van elkaarbetwistende lidstaten verscheidene doeleinden te verwezenlijken, massa's mensenlevens te redden, ook meisjes te laten leren, hoewel nog niet overal. In Esperanto-land beschikken we over het Handvest, de Universele Verklaring van Mensenrechten (al in 1948), zelfs met de plichten op voorstel van Jo Haazen; de Unesco-Koerier sinds 2017 en binnen kort verschijnt het gedenboek over de eerste 70 jaren van de VN (“Van ideeën tot daden”).

Een mooie opdracht gaf de voorzitter van de onderwijzersbond ILEI, Mireille Grosjean: de drie belangrijkste rechten uit te kiezen en de drie minst belangrijke. Voor mij hangt alles met alles samen: dus een beetje lastige taak. Van de 17 nijpende activiteiten voor duurzame ontwikkeling heeft Humphrey Tonkin de nadruk gelegd op de laatste: het sluiten van partnerschappen om de 16 overige waar te maken: voor internationale samenwerking is een neutraal communicatiemiddel een eerste vereiste: ons Esperanto.

Maar hij heeft ook ieder van ons opgeroepen de VN-enquête in te vullen over de toekomstige activiteiten van de VN: wat verkiezen wij? (<https://un75.online/?lang=epo>) Voor het eerst is deze officieel in het Esperanto verschenen. Ik heb zelf geopperd dat er een “Unesco-Koeriertje” zou moeten komen dat vermakelijk, maar geregeld kinderen op de hoogte houdt, zodat ze de voortdurende arbeid leren waarderen van mensen die zich opofferen voor een betere wereld. (Misschien zou de publieke informatie gebaat zijn bij bezoldiging van journalisten uit de publieke middelen, i.p.v. af te hangen van magnaten.)

Vortserĉenigmo

La temo de la enigmo de ĉi tiu eldono estas plantoj, arboj kaj floroj.

Solvu ĉi tiun enigmon per forstrekado de ĉiuj vortoj el la listo sube. La restontaj literoj kune formas frazon.

Kreita de Frank van Hertrooij

I I K S E R K O F L O R I L P
O A I I K A K T O K R B E S O
G A N T O F P K A K E S L A M
I R K E O I O U I R O A K V O
T I F L N N T R O V O B S S S
Ĝ K I O V E O F L R O E E E V
A O L I E L V R A E H L M L A
R L I T R O M T E R G O U O A
D T K E D P K A A F J O B M P
E I O R A E S D N O I L M L A
N V O O N P I O B Ĝ U N A O O
O Z Z A O K D R A B E N O K S
O I R R O O E S P S T B S K K
P B O A R H C I T O E U L N U
O J C O R E Z I N O M O N A N

Vortlisto:

Akvo
Arbo
Bela
Bero
Bulbo
Filiko
Flori
Folio
Frukto
Ganto
Ĝardeno
Herbo
Kakto

Kivo
Konifero
Kreski
Legomo
Luma
Malseka
Mangebla
Musko
Nektaro
Nesti
Nukso
Odoro
Pizo
Planto

Poleni
Pomo
Poto
Radiko
Rezino
Rikolti
Rozo
Semoj
Sitelo
Sporoj
Tero
Tigo
Venena
Verda

Solvo de la lasta vortserĉenigmo:

"Ĉu vi volas naĝi kun mi en la lago morgaŭ?"



School in Togo

De Ans Bakker-ten Hagen

Sinjoro Koffi GBEGLO komence de la jaroj 1990 petis al Hans Bakker prizorgi la financojn por ke en Lomé, Togolando, stariĝu lernejo. En ĝi oni instruu la devigajn fakojn por bazlernejoj. Tamen, krom tio oni instruu Esperanton, aliajn ne-kutimajn fakojn (ekz. higieno, kunvivado, kono de kaj respekto al naturo) kaj la Homaranismo laŭ Zamenhofa ideo. Facila peto, malfacila realigo. Tamen, dank' al la fervora agado de Hans, pluraj nederlandaj institutoj kaj fondusoj (sen rilato al Esperanto) investis en tiu projekto. Ankaŭ multaj esperantistoj pretis donaci por ke oni starigu la lernejon. Aliaj ĉiujare donacas sumon kiu egalas la kostojn por lernanto dum unu lernojaro. Tiel oni helpas al ne-pagipovaj gepatroj kaj la kontribuo ĝenerale estas malalta.

La lernejo realiĝis en 1994. Intertempe ne nur klasoj por baza lernejo, ankaŭ klasoj por etuloj aldoniĝis, poste eĉ okazas instruado al mezgradaj lernejoj.

Koffi GBEGLO emeritiĝis. Konstante li estas envolvita en la evoluo. Lia filo, Dzifa GBEGLO, estas unu el la instruistoj en la lernejo (i.a. pri Esperanto). Li skribis raporton pri la situacio en Instituto Zamenhof dum la kronviroza periodo ĝis nun. Mi esperas ke la membroj de Esperanto Nederland interesiĝas pri ĝi.

P.S. Financa subteno ĉiam bonvenas: NL26 TRIO 0786 7782 10, ten name STF Een school in Togo, Zeist

Kronviroza periodo

Kiel aferoj iras en Instituto Zamenhof (Togolando)

Unua semajno de marto 2020. Malfeliĉego tuŝis la mondon kaj daŭras ĝis nun. Vi jam divenis pri kio ni skribas. Temas pri kronviruso. Preskaŭ ĉiuj landoj de la mondo estas trafitaj, Ankaŭ Togolando. Pro la timiga kreskado de la konsekvencoj de tiu viruso, tro multaj personoj tuŝitaj, la 20-an de marto 2020, la togolandaj aŭtoritatoj ĉesigis sur la tuta nacia teritorio lerneajn kaj universitatajn aferojn. Ĉiuj lernejoj kaj universitatoj devis fermi siajn pordojn, la gelernantoj kaj gestudentoj estis devigitaj resti hejme ĝis nova ordono aŭ dispono de la naciaj aŭtoritatoj. Deviga paŭzo.

La paŭzo daŭris de la 20-a de marto ĝis la 15-a de junio 2020. Preskaŭ tri monatojn. Poste, oni longe kredis ke la lernejoj devis re-eki la

8-an de junio 2020; finfine la naciaj aŭtoritatoj precizigis ke ĉio re-ekos la 15-an de junio 2020 kaj tiel la aferoj okazis.

Dum la kronviroza paŭzo, neniu lerneja afero okazis ene de Instituto Zamenhof. Estis seka paŭzo. Tamen, ĉio re-ekis tiun 15-an de junio 2020. Fakte, ni ne povas diri «ĉio». La lernejoj re-ekis sed ne ĉiuj klasoj estas koncernataj. Nur la klasoj en kiuj estas gelernantoj kiuj trapasos jarfinajn ŝtatajn ekzamenojn estas koncernataj. La aliaj gelernantoj plu restas hejme dum la koncernataj gelernantoj kutime venas al la lernejo por sekvi normale kursojn kaj prepari siajn ekzamenojn. Do, kiel en ĉiuj aliaj lernejoj en Togolando nuntempe, la kursoj okazas normale.

Menciindas ke pro la daŭra kreskado de la kronviroza malsano, ŝanĝoj okazis. En ĉiu lernejo, oni devis organizi eksterordinare la aferojn kaj disponoj naciaj devas esti respektataj. En ĉiu lernejo, en klaso, la gelernantoj ne devas esti pli ol 30. Tiel, en Instituto Zamenhof, la kvara klaso de mezgrado estis dividita en du sekciojn kaj la sesa klaso de la elementa nivelo en tri sekciojn. Plie, en ĉiu sekcio, la instituto disponigis al la gelernantoj desinfektaĵojn, por ke ili purigu regule siajn manojn. Sur la granda korto de la lernejo, estas, por la uzo de ĉiuj, man-purigiloj pere de kiuj ĉiu povas regule lavi siajn manojn uzante sapon kaj puran akvon. Por helpi la gelernantojn efike batali kontraŭ la kronviroza malsano, la geinstruistoj regule al ili donas konsilojn, kontrolas ĉu ili efektive ilin respektas kaj faras ĉion por ke ĉiuj bone konduku ene de la instituto.

Koncerne la lernejarajn programojn, multaj aĵoj ŝanĝiĝis. Normale, en Togolando, antaŭ la fino de julio, la gelernantoj de la elementa kaj de la mezgrada niveloj kiuj trapasis naciajn ekzamenojn konas ĉiujn siajn lernejarfinajn rezultojn. Sed tiun ĉi jaron, la aferoj ne okazos tiel. La gelernantoj de la sesa klaso de la elementa nivelo trapasos sian ŝtatan ekzamenon dum la semajno de la 4-a de aŭgusto kaj tiuj de la kvara klaso de mezgrado trapasos la sian dum la semajno de la 1-a de



septembro. La diversaj rezultoj de tiuj ekzamenoj konatiĝos antaŭ la fino de septembro kaj la venonta lernejar komenciĝos la 26-an de oktobro 2020. La jenajn ŝanĝojn ankaŭ Instituto Zamenhof devas akcepti kaj jam akceptis.

Tiel Instituto Zamenhof spertas tiun kronvirozan periodon. Indas precizigi ke por efike batali kontraŭ la kronvirozan malsanon, ĉiu devas kutime lavi siajn manojn, ĉiam porti vizaĝmaskon, eviti saluti per manpremo, eviti tro proksimiĝi al aliuloj kaj bone zorgi pri si. Utilas neniam forgesi ke nenio estas eterna kaj ke ĉio pasas. Ni restu singardemaj.

Dzifa GBEGLO

Vidu la filmeton: https://youtu.be/VhR_emvO3vE

Novaĵoj

Nova estraro de TEJO

La komitato de TEJO elektis novan estraron por la mandato 2020-2021. En tiu ĉi nova estraro estos i.a. Rogier Huurman (Roĉjo), kiu loĝas en Utreĥto (Utrecht), kaj Klára Ertl, kiu loĝas en Amsterdamo.

Roĉjo skribis al Fenikso: "Post kvin jaroj en la estraro de NEJ kaj sukcesa IJK venis la tempo por sekva paŝo. Do mi esperas plibonigi funkciadon de TEJO kaj tiel kreskigi la junularan movadon".

TEJO = Tutmonda Esperantista Junulara Organizo
NEJ = Nederlanda Esperanto-Junularo
IJK = Internacia Junulara Kongreso



ESTRARANO
Klára Értl

ESTRARANO
Rogier Huurman (Roĉjo)

Nova vortaro Esperanto-nederlanda

Aperis ĉe FEL nova vortaro 1000-paĝa: PIV-ido. Petro Desmet' laboris pri ĝi dum 18 jaroj kaj Yves Nevelsteen kaj Lode Van de Velde dum pluraj monataj provlegis kaj enpaĝigis la verkon. Alia kontribuanto estas Rob Moerbeek.

La Vasta vortaro Esperanto-nederlanda havas kiel subtitolon „PIV-ido”, ĉar ĝi enhavas ĉiujn kapvortojn el PIV, kun la ĝusta nederlanda traduko. Eĉ pli, ĝi enhavas amason da utilaj kaj bezonataj kunmetaĵoj.


Formoj: libro kudre bindita €59.00

Paĝoj: 1040

Eldonjaro: 2020


ISBN: 978-90-77066-65-2

www.retbutiko.be/eo/ero/pivi



Sen familio

Frans Cobben atentigis nin pri la ĵus tradukita libro "Sen Familio", la populara romano de Hector Malot, bone konata en la nederlanda sub la titolo: "Alleen op de Wereld", publikigita en 1878. Michel Fontaine (Francio) kaj Ana Songanta (Koreio) esperantigis ĝin.



La anonco:

<https://esperantobourgenbresse.wordpress.com/2020/07/26/sen-familio/>

Informo pri kiel mendi:

<https://esperantobourgenbresse.files.wordpress.com/2020/07/sen-familio.pdf>

"Mi estas trovita infano.
Sed ĝis okjaraĝo, mi kredis, ke mi havas
patrinon, kiel ĉiuj infanoj. Ĉar kiam mi ploris,
iu virino tiom dolĉe lulis min en siaj brakoj, ke
larmofluo ĉesis. Neniam mi enlitiĝis sen virina
kiso, kaj kiam decembra vento ĵetis neĝon
kontraŭ la
blankajn vitrojn, ŝi prenis miajn piedojn
inter siaj manoj por varmigi ilin, kantante
melodion, kies arion kaj kelkajn vortojn mi
ankoraŭ memoras.

Libroj

De Ineke Emmelkamp

En la lasta Fenikso mi menciis ke haveblas pluraj libroj. Feliĉe unu membro reagis kaj nun legas la diversajn libretojn i.a. pri Ĉinio. Sed la skatolo ankoraŭ ne estas malplena. Do, nun mi ofertas denove kelkajn librojn. Vi pagos nur la sendokostojn.

Jen mia listo:

1. Kandid aŭ la optimisto, verkita de Volter.

Eldono el 1929!

Tradukita de E.Lanti, fama esperantisto el la SAT-medio. 160 paĝoj (malgrandaj)!

2. Vojaĝo en Faremidon kaj Du ŝipoj, verkita de F.Karinthy.

Traduko el la hungara lingvo.

Eldonita en 1934, 83 paĝoj.

3. Poemoj de Armand Su,

Eldonita en Pekino, 1992

Esperantisto de 1956.

Esperable ni, ĉiuj, baldaŭ denove povas vojaĝi tra la mondo. Sed nun vi povas ĝui la legadon de tiu ĉi poemo de Armand Su. Rigardu la kadron.

4. Du lernolibroj:

a. Kurso por la elementa diploma, el 1983, verkita de Bert de Wit

b. Esperanto leerboek, de Zondervan en Manders, junio 1952.

5. Sep libretoj, eldonitaj de Ĉina Esperanto-eldonejo.

Kiom da vi deziras ricevi? Mi faros la elekton!

Se mi ricevas pli ol unu peton por la sama libro, mi elektas al kiu mi sendas ĝin. Ne eblos diskuti pri tio.

Salutojn, Ineke Emmelkamp

sekretario@esperanto-nederland.nl

Mi amas vin, Ĉinio

En la mondo estas multaj belaj lokoj,
Kiuĵ ofte vekas mian fantazion,
La antikvaj Piramidoj de Egiptujo,
la mistera blanka nokto de Rusujo,
La ĉarma krepusko ĉe Sejno,
Kaj la meznokta suno de Norvegujo
Sed, nur vin mi plej amas – bela Ĉinio

Pri Armand Su

En aprilo 1968 Armand Su estis arestita pro "kontraŭrevolucia aktiveco", i. a. pro sia Esperanto-agado, kaj kondamnita al 20-jara mallibero. Antaŭ sia liberiĝo kaj senkulpiĝo en januaro 1979 Su sekrete instruis Esperanton al pluraj malliberuloj. La unua poemo - *Mi amas vin, Ĉinio* - estas verkita en 1962.

Foto: Travel.sina.com.cn

Oproep voor bijdragen

Elk lid van Esperanto Nederland houdt zich op zijn of haar eigen manier bezig met Esperanto, of het is met het bestuderen van de grammatica, het schrijven van gedichten of andere teksten, het ontmoeten van andere Esperantisten, fysiek of op social media. We roepen u op om uw ervaringen met ons te delen. Uw verhalen zijn meer dan welkom, zowel in het Esperanto als in het Nederlands. Stuur u ook foto's mee. Grammaticale fouten corrigeren we. Inkorten en andere aanpassingen doen we alleen in goed overleg met u. Wanneer u wilt, kunnen we ook een interview houden. Stuur uw bijdrage op naar: redakcio@esperanto-nederland.nl.



Kronviruse sekura: Esperanto-studoposttagmezo je la 21-a de novembro 2020

Ĉu Esperanto-lecionoj en la kronviroza epoko? Kompreneble tio okazas virtuale, sed organizi ĉeestajn kunvenojn estas nun malfacile. Ekzemple ni, organizantoj de la tradiciaj studosemajnfinoj de Esperanto Nederland, jam la duan fojon devis decidi pri nuligo de planata semajnfino. Tre domaĝe por la fidelaj vizitantoj!

Sed... ni serĉis alternativon kaj nun ni estas pretaj anonci ĝin. Sabaton la 21-an de novembro okazos en Amsterdamo Esperanto-studoposttagmezo. Tie estos aranĝataj lecionoj je du niveloj: nivelo A por tiuj kiuj nun studas en komenca kurso aŭ ĵus finis ĝin, kaj nivelo B por progresantoj/progresintoj. Ĝi do estos kunveno malpli longdaŭra ol kutime, kaj ankaŭ malpli grandskala: estos loko por entute 25 partoprenantoj, tiel ke ni povos teni nin je sekura distanco unu de la aliaj.

Bedaŭrinde ĉi-foje mankos al ni la bonetosaj paŭzoj kaj vesperoj, kaj la bela pejzaĝo, sed estos eblo renkontiĝi kaj lerni sub la gvidado de bonegaj Esperanto-instruistoj.

Kie

La kursejo troviĝas en Okcidenta Amsterdamo, je promena distanco (ĉ. 10 minutoj) de la trajnstacio Lelylaan. Ĝi estas ankaŭ facile atingebla per aŭto kaj disponeblas sufiĉe da spaco por parkado (tamen pagenda).

Kotizo

La kotizo estas €15 por membroj de Esperanto Nederland, NEJ aŭ alia landa Esperanto-organizo, kaj €20 por ne-membroj. Se vi ne povos veni pro (eblaj) kronvirusaj simptomoj ni redonos al vi la kotizon.

Aliĝo

Aliĝo validas per pago de €15,- aŭ € 20,-. La tuta sumo estu ne pli malfrue ol la 12-a de novembro 2020 en konto NL 10 TRIO 078.68.44.167 de Esperanto Nederland en Capelle aan den IJssel. Menciu: 'studoposttagmezo 21/11'. Se vi volas aliĝi post la limdato de la 12-a de novembro 2020, bv. kontakti la organizantojn por informiĝi pri ebloj.

Kontanta pago ne eblos dum la aranĝo mem.

Aliĝu per la retejo de Esperanto Nederland
<https://esperanto-nederland.nl/esp/formularoj/studoposttagmezo.php>

Ineke, Lilian kaj Arjen-Sjoerd
studosemajnfino@esperanto-nederland.nl

PostNL
Port betaald
Port payé
Pays-Bas

Fenikso
25a ĵarkolekto, n-ro 5
sept. - okt. 2020